

Esperanto U S

Bi-monthly bulletin published by Esperanto-USA ★ 2007/5-6

Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-USA ★ 2007/5-6

En la Numero

- ★ El la Centra Oficejo3
- ★ Intervuoj kun la Estraro.....4
- ★ Junulara Angulo4
- ★ Esperanto translations
of Shakespeare
in Folger Library5
- ★ AAIE-angulo:
Do You Teach Esperanto?....6
- ★ La Espero.....7
- ★ Preĝo sub la
Verda Standardo.....7
- ★ La Vojo.....7
- ★ La Interna Ideo:
ĉu ankoraŭ grava?8-9
- ★ 'Neŭtrala fundamento'
signifas Esperanton10
- ★ Esperanto kiel ilo por
plibonigi la mondon.....11
- ★ Aktivuloj de E-USA pri
la Interna Ideo12-14
- ★ Esperanto estu Instrumento
de Interkompreno.....14
- ★ Intervjue:
Lusi Harmon15-16
- ★ Lusi Harmon pri
"La Pasporto"17-18
- ★ Zamenhof L. L.....19-22
- ★ Beletre:
Teksasa Knabino22
- ★ Libroservo23
- ★ Vojaĝe.....24

Ĝis la bela sonĝo de l' homaro...



por eterna ben' efektiviĝos!

Esperanto-USA
 PO Box 1129, El Cerrito CA
 94530, USA/USONO
 ☎ 510/653-0998; 2510/653-1468
 ✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Philip G. Dorcas
 Vice President/Vicprezidanto: Steven D. Brewer
 Secretary/Sekretario: Julie Spickler
 Treasurer/Kasisto: Anna Bennett
 Other Board Members/Aliaj estraranoj: Joel Amis, Ĵenja Amis, Trevor Andrews, D. Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi Harmon, Robert L. Read, Tim Westover, Christopher Zervic.

Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo: William Harris

Esperanto USA
 Bi-monthly bulletin published by Esperanto-USA
 Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-USA
 Vol. 47, No. 5-6 2007
 ISSN 1056-0297

Editors/Redaktoroj:
 Joel Amis kaj Ĵenja Amis
 Layout/kompostado: Ĵenja Amis
 ✉ yevgeniya_amis@yahoo.com

Materials for Esperanto USA should be sent to/Materialojn por Esperanto USA oni sendu al:
 Esperanto USA (Joel & Ĵenja Amis)
 2025 Peachtree Rd. NE, #927,
 Atlanta, GA 30309, USA/USONO
 or by e-mail/aŭ retroŝte al:
 joelamis@yahoo.com

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of Esperanto-USA or its bulletin/La opinioj esprimataj en tiu ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de Esperanto-USA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to Esperanto-USA/Estas permesate reaprigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la republikigita materialo al Esperanto-USA.

Saluton karaj gesamideanoj!

Ni tre esperas ke vi pasigis agrablajn Zamenhof-tagon, Novjaron kaj ceterajn festojn! Parolante pri Zamenhof-tago, ni deziras bonvenigi vin al la (duobla) numero de Esperanto USA dediĉita al Zamenhof kaj la Interna Ideo!

Kvankam difinoj de la Interna Ideo varias de unu esperantisto al la alia, estas sendube ke la Interna Ideo ludas treege gravan, eĉ esencan rolon en nia Movado jam de la naskiĝo de Esperanto – aŭ, pli ĝuste, jam de antaŭ la naskiĝo de Esperanto, ĉar sen tiu kerna idealismo la lingvo ne estus naskiĝinta.

Sed ne atendu trovi definitivan difinon de la Interna Ideo en tiu ĉi numero – la Interna Ideo estas io ne facile priskribebla... ĝi estas io kion oni sentas, spertas, vivas. Ni esploras la Internan Ideon diversmaniere en tiu ĉi numero. Pluraj membroj/aktivuloj de Esperanto-USA esprimas siajn pensojn kaj opiniojn pri la Interna Ideo – vi vidos ke, malgraŭ diverseco de opinioj, estas komuna fadeno kiu ligas ilin.

Ni ankaŭ rigardos la vivon kaj pensojn de tiu granda homo al kiu ni ŝuldas la ekziston de nia lingvo. Ŝajne malfacilas trovi pli belan esprimon de la Interna Ideo ol en zamenhofaj poemoj kiel “La Espero” aŭ “Preĝo Sub la Verda Standardo”.

Post longa paŭzo ni daŭrigas la serion “Gigantoj de ELNA” per konatiĝo kun multjara aktivulino (kaj duono de la fama kaj amata Harmon-a duopo) Lusi Harmon. En apuda intervjuo Lusi rakontas pri sia monumenta (kaj certe al ni ĉiuj konata) projekto “Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo”.

Estas tamen iom da malbona novaĵo – ĉi tiu estas bedaŭrinde nia lasta numero. Iom da historio: en la unua duono de 2007 pro ŝanĝiĝoj en la profesia vivo kaj aliaj aferoj ni trovis nin superŝutitaj de laboro – sekve, kiel vi rimarkis, Esperanto USA prokrastiĝis dum kelkaj monatoj. Ĝi atingis punkton kie ni pensis ke ni devos rezigni la redaktadon. Sed finfine aferoj trankviliĝis (interalie pro tio ke Ĵenja herediĝis la redaktadon de la revuo Kontakto al nova redaktoro) kaj evidentiĝis ke ni ja povos daŭrigi (kaj ja ĉiam volis daŭrigi – pro tio la decido rezigni ne venis facile). Sed la kubo jam estis ĵetita... kaj oni decidis doni ŝancon al freŝa homo.

Ekde la unua numero de 2008 la redaktoro de Esperanto USA estos Hoss Firooznia. Ni gratulas al Hoss kaj esprimas niajn bondezirojn por fruktodonan redaktadon!

Ni dankegas al ĉiuj legantoj kiuj kontribuis aŭ iel ajn subtenis Esperanto USA-n dum nia deĵoro. Sen vi ni ne povintus produkti altkvalitan eldonadon. Dankon, amikoj – vi vere faris nian taskon tre agrabla! Do kvankam ni ne plu vidos vin de tiu ĉi paĝo, ni ja esperas vidi vin diversloke en Esperantujo. Ni vere esperas vidi vin ĉiujn dum nia kongreso en Montrealo ĉi-somere. Montrealo estas belega urbo kaj la montrealanoj estas bonegaj kongresgastigantoj – ne maltrafu ĝin!

Ĝis la revido ie en Esperantujo!

Joel kaj Ĵenja

Greetings dear samideanoj (fellow Esperantists)!

We hope that you had a pleasant Zamenhof Day, New Year and other holidays! Speaking of Zamenhof Day, we wish to welcome you to the (double) issue of Esperanto USA dedicated to Zamenhof and the Interna Ideo (Inner Idea).

Although definitions of the Interna Ideo vary from one Esperantist to the other, it's beyond doubt that the Interna Ideo has played a very important, even essential role in our Movement ever since the birth of Esperanto – or, more accurately, even before Esperanto's birth, because without that core idealism the language wouldn't have been born.

But don't expect to find a definitive definition of the Interna Ideo in this issue – the Interna Ideo is something not easily described... it's something which one feels, experiences, lives. We will explore the Interna Ideo in various ways in this issue. Several members/activists in Esperanto-USA express their thoughts and opinions about the Interna Ideo – you will see that, in spite of a diversity of opinions, there is a common thread linking them.

We will also take a look at the life and thought of that great man to whom we owe the existence of our language. It's probably difficult to find a more beautiful expression of the Interna Ideo than in Zamenhof's poems such as “La Espero” (“Hope”) or “Preĝo Sub la Verda Standardo” (“Prayer Under the Green Standard”).

After a long break we are continuing the series “Giants of ELNA” by getting acquainted with longtime activist (and half of the famous and beloved Harmon duo) Lucy Harmon. In an adjacent interview Lucy tells about her monumental (and certainly known to us all) project “Esperanto: Paporto al la Tuta Mondo”.

There is however some bad news – this is, unfortunately, our last issue. A little bit of history: in the first half of 2007 we, due to changes in work life and other things, found ourselves overwhelmed by work – as a result, as you noticed, Esperanto USA was delayed for several months. It reached a point where we thought that we would have to give up editing Esperanto USA. But finally things calmed down (i.e. because Zhenya passed on the editorship of Kontakto to a new editor) and it became apparent that we would be able to continue after all (and we had always wanted to continue – for that reason the decision to give it up didn't come easily). But the die was already cast...and it was decided to give a fresh person a chance.

As of the first issue of 2008 the editor of Esperanto USA will be Hoss Firooznia. We offer our congratulations to Hoss and express our best wishes for fruitful editing!

We deeply thank all the readers who contributed or in any way supported Esperanto USA during our tenure. Without you we wouldn't have been able to produce a high-quality publication. Thank you, friends – you really made our job pleasant! So, although we will no longer see you from this page, we do hope that we will see you at various places in Esperanto-land. We really hope to see you all at our convention in Montreal this summer. Montreal is a beautiful city and the Montrealers are great convention hosts – don't miss it!

Till we meet again somewhere in Esperanto-land!

Joel and Zhenya



Kio (mal)novas en la Centra Oficejo?



KOMPLEZE DE V.H.

Bill Harris

Dum la lastaj tridek jaroj la Centra Oficejo de Esperanto-USA estas en la sama konstruaĵo en Emeryville, Kalifornio. Bedaŭrinde, en 2008 oni findetruos la konstruaĵon por starigi kundomaron. Do, Esperanto-USA devas trovi novan hejmon por la CO.

La nuna oficejo konsistas el kvar ĉambroj en 1000 kvadrataj futoj. Estas granda ĉefĉambro kun tri malpli grandaj ĉambroj apude. En la ĉefĉambro estas la vendotaĵoj, sur bretoj aŭ en skatoloj. Laŭ la inventaro,

pli ol 44 mil vendeblaj aĵoj situas en la oficejo. Proksimume duono de ili estas pingloj, poŝtkartoj kaj similaj memoraĵoj – la cetero, proksimume 22 mil, estas libroj, KD-oj kaj DVD-oj. En ĉi tiu ĉambro estas ankaŭ la aŭdiokased-kopiilo kaj multaj originalaj aŭdiokasedoj. Dum antaŭaj jaroj oni kopiis kasedojn kaj vendis ilin. Nun estas projekto konverti la kasedojn al KD-oj.

Flanke estas la ĉambro por la du komputiloj, printiloj, faksilo kaj dosier-ŝrankoj. La komputilo estas la centro de la oficejo, ĉar preskaŭ ĉiu tasko postulas ĝian uzon.

Apud la ĉefĉambro estas ankaŭ la ĉambro por paki kaj sendi pakaĵojn. Tie estas la kartonaj skatoloj, remburitaj kovertoj, glubendoj ktp. Tie estas ankaŭ la afrankmaŝino kaj pesiloj. Plue, estas ekzempleroj de broŝuroj kaj flugfolioj sendotaj kun mendoj al unufojaj aĉetantoj, kaj inform-pakaĵoj, pretaj por sendi al informpetintoj.

La lasta ĉambro estas la arkivĉambro kie estas diversaj aĵoj el la antaŭaj jaroj de Esperanto-USA. La libroservo superfluas en ĉi tiun ĉambron, ĉar tie estas la T-ĉemizoj kaj kromaj skatoloj de libroj.

La nova oficejo sendube havos malsaman aranĝon. Eble pli bona, eble malpli. La translokiĝo mem postulos multe da planado por transloki ĉion en kiel eble plej malmulte da tempo. Eble estontece mi skribos artikolon pri tio.

Nova Loko por la CO Trovita!

Bill Harris

La estraro de Esperanto-USA lastatempe akceptis proponon, ke la CO translokiĝu al nova loko komence de februaro 2008. Translokiĝo estas necesa, ĉar nia spaco en la nuna loko ne estos havebla post printempo 2008. Nia nova oficejo estos ĉe 1335 Stanford Ave, Suite 300 – ĝi estas belaspekta konstruaĵo kiu estas tre proksima al la nuna oficejo.

Trovi novan lokon por la CO estis malfacile, ĉar pro la granda kvanto de libroj estis necese ke la oficejo estu sur strat-

etaĝo aŭ ke lifto estu havebla. Tiaj spacoj kutime estas tro multekostaj por nia buĝeto, do Bill Harmon serĉis dum multaj semajnoj senrezulte antaŭ ol li trovis ĉi tiun lokon.

Nun mi klopodas fari planon transloki ĉion dum la lastaj tagoj en januaro. Granda laboro! Kompreneble, volontuloj en ĉi tiu regiono helpas transloki ĉion. Dum la translokiĝo, la libroservo ne funkcios, kaj respondoj al telefonvokoj kaj retmesaĝoj estos prokrastitaj.

Esperable, iam en februaro ĉio estos en ordo, kaj la CO funkcios normale.

Intertempe, mi fotos la progreson de la translokiĝo por ke la legantoj de **Esperanto USA** povu vidi ĉion kio okazas ĉe la oficejo.

Membership Renewal Campaign Under Way!

Don't miss out on the benefits and resources you receive by your membership in Esperanto-USA and don't miss out on your chance to make a contribution to the Esperanto movement. This is a particularly important time for the movement in the United States to increase in strength. Esperanto speakers around the world are awaiting our show of strength in the movement. Please don't wait to renew your membership in Esperanto-USA for 2008.

Membriga Kampanjo Efektiva!

Ne rezignu pri la benoj kaj rimedoj kiujn vi ricevas de Esperanto-USA kaj via ŝanco kontribui al la Esperanta movado. Nuntempe estas aparte grave ke la usona movado plifortiĝu. Esperanto-parolantoj ĉirkaŭ la mondo atendas nian fortecon en la Movado. Bonvole ne prokrastu realiĝi al Esperanto-USA por 2008.

Nekrologo

Richard E. Wood (1940-2007), dumviva membro de UEA, forpasis la 25-an de septembro en Keaau (Havajo, Usono). Laŭnaske brito, li estis ano de Kembriga E-Klubo en la fruaj 1960-aj jaroj. Li poste doktoriĝis en Usono kaj fariĝis profesoro pri lingvistiko, ĝis kiam en la 1980-aj jaroj li retiriĝis al Havajo, kie li fondis vendejon de fruktoj kaj kafo. La kontribuo de Wood al la starigo de interlingvistiko kaj esperantologio kiel akceptataj studkampoj en universitataj medioj estis tre signifa, i.a. pro lia alta reputacio en la lingvistika mondo. Li estis redaktoro de *La Monda Lingvo-Problemo* 1973-1976 kaj de ĝia daŭriganto *Language Problems and Language Planning* 1977-1984. Wood aŭtoris la E-dokumenton *Current work in the linguistics of Esperanto* (1982) kaj multe artikolis en fakaj revuoj pri Esperanto kaj rilataj temoj. Li havis eksterordinaran kapablon kvazaŭ ensorbi lingvojn, ĉefe per DX-aŭskultado, lia granda ŝatokupo. Li komprenis centon da lingvoj kaj flue parolis ĉ. 12. Lia gvidlibro pri DX-aŭskultado, *Shortwave voices of the world* (1969), estas vaste konata.

La nov-elektitaj estraranoj respondas la demandojn de Esperanto USA



J. AMIS

(daŭrigo; komenco en Esperanto USA 2007:3-4)

Anjo Harlow

- **Bv. priskribi viajn planojn kiel estrarano!**

- Nuntempe mi kunlaboras kun la Prezidanto por efektiviĝi lian laborplanon por la organizo.

- **Kion vi volus atingi dum via oficperiodo?**

- Bone prezenti la sugestojn de la membroj por plibonigi la Movadon. Trovi manieron por instigi pli da membroj. Helpi kiel ajn estas bezonate en la Centra Oficejo. Pli da interkomunikado inter la estraranoj... kaj kelkajn aliajn.

- **Kio, laŭ via opinio, estas plibonigenda en Esperanto-USA – kaj kiel vi povas helpi plibonigi tion, kiel estrarano?**

- Havi pli da familio... Ni

BEZONAS pli da esperantistoj! Kiel helpi plibonigi? Mi petos sugestojn de la membroj...

- **Vi estas estrarano de nia organizo jam longan tempon...**

- Jes, sed ne tro...Mi estis surprize elektita en 1990, kiel la unua ina ELNA-Prezidanto.

- **... kaj de tiu ĉi perspektivo vi povas bone vidi, kiel ŝanĝiĝis kaj evoluis la organizo.**

- Jes, ni nun havas pli da inaj estraranoj (kvin), ni havas familiajn ge-estraranojn... sed atendas la duan Prezidantinnon.

- **Kiel Esperanto-USA nun diferencas de ELNA, ni diru, de antaŭ 20 jaroj?**

- En 1992 ni komencis enmeti elektronikajn maŝinojn por efikigi la Centran Oficejon. Komputilo, faksmaŝino, numero 800... Poste la 800-esperanto okazis... Nuntempe, la komputilo regas. Informado, lernado, komunikado, libromendado, membra revuo, reto... estas inter ni. Kaj ĝi grandege helpas nian Movadon...

Kio ne ŝanĝiĝis estas la bonega subteno de niaj membroj – same kiel antaŭe... kaj

mi DANKEGAS ilin.

- **Kio, kion oni povas lerni de la pasintaj spertoj, estas aktuala kaj aplikebla ĝuste nun?**

- La membroj estas la movado por Esperanto... sen ili la Movado ne kreskos... Kune ni fortigos la Familion.

Jenja Amis

Mia plano kiel estrarano estas grandigi kaj diversigi (laŭ aĝo, sekso, raso ktp.) la membraron de Esperanto-USA kaj, kompreneble, reteni la jamajn membrojn. Ekde kiam mi la unuan fojon partoprenis la kongreson de nia organizo, la unua kaj tre agrabla malkovro pri Esperanto-USA estis ĝia unueco: mi vidis, ke eĉ malgraŭ malsamaj opinioj pri io, oni ĉiam estas afablaj kaj pretaj al la dialogo (tio, bedaŭrinde, ege mankas nun en mia hejmlando...) por *bono de la organizo*, kaj ne por kontentigi la proprajn ambiciojn. Mi vidis homojn kiuj dediĉis sian tutan vivon al la Interna Ideo, kaj tio estas vere granda ĝojo por mi.

Aliflanke, mi vidis ankaŭ kelkajn plibonigindaĵojn, ekzemple ne sufiĉa diverseco laŭ aĝo, sekso kaj raso. Iam mi

verkis tutan artikolon en Esperanto USA pri tio, kaj mi komprenas, ke ne estas tiom facile korekti tion: sed kiel estrarano, mi ja provos ŝanĝi tiun ĉi situacion. Kompreneble, necesas multe labori por kreskigi la ĝeneralan nombron de la membroj kaj instigi esperantistojn, sed ankoraŭ ne membroj, membriĝi (kaj tio estas granda defio, verŝajne, por ĉiuj Landaj Asocioj) por daŭrigi kaj finance subteni nian organizon.

Krome, mi esperas denove fari Esperanto-kurson en Atlanto kaj pli aktive reklami Esperanton en la universitatoj, kunorganizi plian Sudorientan Kongreseton ktp. Mi ŝatus plibonigi la nunajn informilojn pri Esperanto por Esperanto-USA – kaj mi pretas fari kion ajn mi povos por la bono de la organizo!



T. RUSSEL



KOMPLEZE DE D.R.

Darcy Ross ("Darsi Roso") <deerawzzz@gmail.com> estas finjara gimnazia studento kiu

Junulara Angulo

loĝas en urbeto apud Ĉikago, Illinois. Ŝi aktive partoprenas en la Teatra Klubo (kie ŝi estas sekretario), la plej prestiĝa horo en sia lernejo (kie ŝi estas prezidanto), la Akademia Nacia Honora Societo, kaj Japana (lingva) Nacia Honora Societo. Rilate al la hobiaj, ŝi ŝatas legadon, verkadon, ret-uzadon, komputil-uzadon, ludadon, kantadon kaj kajakadon.

Ŝiaj celoj por Usona Esperantista Junularo (USEJ) estas fari por USEJ aktualan

retcentron kiu enhavu:

- materialojn por Esperanto-grupoj/kluboj

- lernilojn (ankaŭ ligilojn al aliaj instru-retejoj)

- novan katalogon por bonaj Esperantaj retejoj (mi ĉagreniĝas de retejoj kiuj havas plurajn nefunkciajn ligilojn).

Krome, mi volus:

- organizi verkajn konkursojn por plibonigi *Wikiversity* kaj *Unilang* (ktp.). Eble eĉ organizi verkajn konkursojn por

Esperanta Vikipedio!

- havi aktivan forumon aŭ pliakktivigi ekzistantan forumon.

- eble parigi lokajn grupojn kun grupoj de aliaj lokoj, aŭ eĉ de aliaj landoj. Tio estus interese maniero por lerni pri aliaj kulturoj kaj ideoj per la uzado de Esperanto.

Kompreneble, USEJ ankaŭ faru kunvenojn en diversaj lokoj.

Ŝi esperas studenti en Knox kolegio por studi biologion (specife genetikon) kaj la japanan lingvon. Ŝi celas ĉiam partopreni la Esperantomovadon kaj ankaŭ ĉiam apogi la Internan Ideon.

Esperanto translations of Shakespeare added to the Folger Library



Twenty works of Shakespeare have been translated into Esperanto — some of them more than once. But until recently only one has made its way into the collection of the Folger Shakespeare Library, in Washington, DC, the world's largest library collection devoted to Shakespeare and his time.

That changed on November 15, 2007, when a delegation from the Esperantic Studies Foundation presented the library with a complete set of Shakespeare translations in Esperanto — 26 volumes in all. The earliest, *The Tempest*, dated from 1905 and the latest, the ninth edition of *Hamlet*, from 2006.

The Library already has a copy of an earlier edition of *Hamlet*, translated by the creator of Esperanto, Dr. L. L. Zamenhof, in the final years of the 19th century.

Esperanto is an international language, designed by Zamenhof as a second language for the world, and used and spoken today by several hundreds of thousands of people across the globe. It boasts an extensive original literature and a large number of translated works by everyone from Dante to Tolkien and from Plato to Freud, and including also large numbers of works from Asian languages.

“This is a valuable addition to our collection. It’s not often that someone brings in 26 volumes none of which we already have,” remarked Richard J. Kuhta, the Eric Weinmann Librarian at the Library, who accepted the gift on the library’s behalf. He was accompanied by Georgianna Ziegler, Head of Reference.

“It took us quite some time to find the complete collection,” said Humphrey Tonkin, of the University of Hartford, in making the presentation on behalf of the Foundation. “Some were easy to locate, but a few required real detective work. Esperanto books are often published in out of the way places by out of the way publishers, and they take some finding.” He hopes that over time the Foundation will be able to add further Esperanto Shakespeareana to the collection, in the form of playbills and the like. Only four

Shakespeare plays have been given full-blown productions in Esperanto: *Hamlet* in Antwerp in 1928, *The Comedy of Errors* in Bulgaria in 1963, a recent production of *King Lear* in Vietnam, and (the very first), *As You Like It* in an outdoor performance during the World Esperanto Congress in Washington in 1910.


Asked about quality, Tonkin remarked that, as one might expect, the quality of the translations varies. Some are quite amateurish, others done with great fidelity to the original and with an eye to presentation on the stage. He should know: he has translated two of the plays — *Henry V* and *The Winter’s Tale* — and hopes one day to see them performed.

Tonkin was accompanied by Dr. E. James Lieberman, Washington psychiatrist and author of a biography of psychologist Otto Rank, and Dr. David Gaines, a composer — both of them active users of Esperanto. Gaines’s first symphony (1998), recorded under the MMC label, bears the name “Esperanto.”

(Press Release from Dr. Humphrey Tonkin)

Karaj,
 Plaĉis al mi la recenzo de William R. Harmon pri *Beletra Almanako I*. Mi tamen prikomentas unu lian aserton: “Enestas tri eroj kiujn verkis usonaj esperantistoj,” rilate al kiuj li mencias la nomojn de Tim Westover, Brian E. Drake kaj Den Drown.
 Pri tio mi atentigas, ke la 4-an de oktobro 2000 mi civitaniĝis ĉi-lande kaj tiam mi forneis mian sud-afrikanecon. Pro la nova rasismo kontraŭblankula kaj konkrete diskriminacio de la nuna reĝimo en tiu mia naskiĝlando, mi plene malakceptas la implicitan ideon, ke mi iel plurestas sud-afrikano.
 La preterlaso de ia mencio pri mia nova statuso sugestas, almenaŭ por mi, ke mi

nun fariĝis homo senlanda, tiom pli ĉar baldaŭ post mia civitaniĝo mi havis ĉi-punkte malagrablan sperton. Certa viro, kiu plurfoje verkis por la plej grava ĵurnalo ĉi-regione, eksplicite diris al mi: “Vi ne estas kaj neniam povos esti usonano! Por tio necesas naskiĝi ĉi tie, en almenaŭ la kvina generacio. Li certe ne estas la sola persono kun tia opinio, kiu potencie lezas la patriotismon de ni novaj civitanoj.
 Mi certas, ke William R. Harmon, elektante siajn vortojn, ne povis tion eĉ imagi. Malgraŭ ke iuj el ni estas pri ĉi tiu afero vere sentemaj.
 Kore salutas,
 Edwin de Kock



If you would like to announce your local group or any other Esperanto-related activity in the 2008 UEA Jarlibro, please contact the Central Office for details and prices. All announcements must be received by UEA before January 31, 2008.

Do you teach Esperanto?

D. Gary Grady

Do you teach Esperanto? Have you ever thought about teaching it? While many speakers learn Esperanto from books or even the Internet, there's a lot to be said for traditional courses. They're a good way to introduce more people to our language, and they're especially useful in helping beginners develop confidence and fluency in speaking. For young people, an Esperanto class is a good way to introduce languages in general and cultures other than their own. And classes are rewarding for teachers as well as students.

One of the best ways to stay current on teaching methods and resources, and stay in touch with other Esperanto teachers in the U.S. and abroad, is to join the American Association of Teachers of Esperanto. Members of AATE are also automatically members of the *Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj* (ILEI) and receive two quarterly magazines: – *Internacia Pedagogia Revuo*, magazine entirely in Esperanto containing articles on teaching and reports about classes from all over the world, and – AATE's own *Bulteno*, with news, short articles on teaching tech-



During AATE meeting (Tijuana, 2007)

niques, updates on the organization's activities, etc., in a mix of English and Esperanto.

Besides publishing its *Bulteno* and acting as the U.S. branch of ILEI, AATE collects and reports statistics on Esperanto teaching, offers seminars about teaching during Esperanto-USA's annual *Landa Kongreso*, creates and manages the U.S. system of Esperanto examinations, helps coordinate administration of the international exams in the U.S., and acts as a point of contact for everyone in the U.S. who teaches Esperanto or would like to.

Membership, which like that of

Esperanto-USA runs on a calendar year basis, costs \$30 (\$20 if you choose to receive the two publications via the Internet). To join, send your name, address (postal and email) and telephone number, together with your dues (payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AAIE") to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027. Please indicate whether you're a professional teacher (and if so, whether active or retired and the name of your school). If you'd like to have your phone number, email address, or other information omitted from the AAIE membership list, please so indicate.

Three Esperanto metaphors

E. James Lieberman

An instrument. William Auld said that Esperanto is unique among artistic creations because it is an artistic medium for others to use creatively. Zamenhof is another Stradivarius! That name is synonymous with "finest violin" – an art object that enables others to make beautiful music, translating from composer to listener, from mute symbols on paper to radiant, meaningful sound.

Instrumento. Laŭ William Auld, Esperanto unikas inter artaj kreaĵoj ĉar ĝi estas perilo por siaj uzantoj krei arte. Zamenhof estas kiel nova Stradivarius! La nomo de tiu sinonimas al la violono plej bona – artaĵo kiu ebligas homojn ludi belan muzikon, tradukante de komponisto al aŭdanto, de mutaj simboloj sur papero al radianta, signifoplena sono.

An open source operating system.

Linux, the computer operating system known by relatively few who use and love it, has a small, stable core and belongs to its users, who have the right to make changes to improve its function. The changes, to be adopted, must be validated by users. This was Zamenhof's model with Esperanto. Logic and emotion join in this kind of enterprise: Linux is both practical and attractive. Users admire its conceptual beauty and non-commercial idealism while being intellectually engaged in its functionality.

Funkciiga sistemo font-atingebla. Linux, la komputila funkciiga sistemo konata de malmultaj kiuj ĝin uzas kaj amas, havas kernon etan, stabilan, kaj apartenas al siaj uzantoj, kiuj rajtas ĝin ŝanĝi por plibonigi funkciadon. Por esti adoptitaj, la ŝanĝojn devas validigi la uzantoj. Tiu ĉi modelo samas al tiu de Zamenhofa Esperanto. La logiko kaj

emocio kunligiĝas en tia entrepreno: Linux estas kaj praktika kaj bela. La uzantoj ŝatas ĝian konceptan belecon kaj senkomercan idealismon kiam ili okupadas sin mense pri ĝia funkcio.

A relationship. To learn a second language well—becoming bilingual by choice—is like a good marriage. We commit both head and heart, falling but also rising in love which is not blind but open-eyed, hearing, and thought provoking. We admire the practicality and logic of Esperanto and love its power to join us, poetic or prosaic. It connects people for life.

Rilato. Lerni bone lingvon duan – volonte dulingviĝi – similas al bona geedziĝo. Oni dediĉas kaj menson kaj koron, enamigante duoble, amo ne blinda sed apert-okula, aŭskultema, kaj pensiga. Ni admiras la praktikecon kaj logikon Esperantajn kaj amas ĝian ligo-povon, poezian kaj prozan. Ĝi kunigas homojn por- kaj dumvive.



WIKIPEDIO

La Espero

L.L. Zamenhof

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion:
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj;
sed dissaltos la obstinaj baroj,
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

Preĝo sub la Verda Standardo

L.L. Zamenhof

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
Hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro:
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nun kredo de *koro*.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
Ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batale;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
Antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen, senfine!

La Vojo

L.L. Zamenhof

Tra densa mallumo, briletas la celo
al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo, en nokta ĉielo,
al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
nek batoj de l' sortoj,
nek moko de l' homoj,
Ĉar klara, kaj rekta, kaj tre difinita,
ĝi estas la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankiĝante,
ni iru la vojon celitan.
Eĉ guto malgranda konstante frapante,
traboras la monton granitan.

*L' espero, l' obstino,
kaj la pacienco,*

jen estas la signo per kies potenco
ni, paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
ni semas kaj semas konstante.

Ho ĉesu, mokante
la homoj admonas,

Ne ĉesu, ne ĉesu! En kor' al ni sonas.
Obstine antaŭen, la nepoj vin benos,
se vi pacienco eltenos.

Se longa sekeco, aŭ ventoj subitaj,
velkantajn foliojn deŝiras,
ni dankas la venton, kaj repurigitaj,
ni forton pli freŝan akiras.

Ne mortos jam nia
bravega anaro.

Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro.
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita
al cel' unufoje signita.

Joel Amis

Antaŭ 120 jaroj naskiĝis nia lingvo. Ekde tiam ĝi fariĝis la plej sukcesa planlingvo – tiom ke neniu alia planlingvo rivalas ĝin. Esperanto kreskis de unu parolanto en la tutmondan parolkomunumon kiun ni konas hodiaŭ (mi ĉi tie preterlasas la demandon pri ekzakta nombro de tiu parolkomunumo). Esperanto estas parolata en esence ĉiu lando de la mondo. Esperanto havas (proporcie) vastan literaturan verkaron, diversspecajn kongresojn okazantajn tra la jaro en ĉiuj kontinentoj, kaj eĉ denaskajn parolantojn. Esperanto estas uzata por la tuta gamo de homaj agadoj, ekde sciencaj disertacioj ĝis plej ordinara familia vivo. Esperanto atingis sian nuna staton *sen* la propra ŝtato, *sen* propra armeo, kaj ofte eĉ spite al kontraŭstaro (kaj rekta kaj malrekta) kaj eĉ subpremado fare de iuj registaroj. Esperantistoj marŝis antaŭen spite al moko fare de cinikuloj kaj foje eĉ persekutoj fare de diktatoroj. Sed kiel Esperanto sukcesis ne nur supervivi ĝis nun, sed eĉ konstante (eĉ se nur poimete) kreski? Kial Esperanto estas la sola vaste uzata planlingvo, dum Volapuko kaj Ido estas esence muzespecimenoj? Kio diferencigas Esperanton disde ĉiuj aliaj planlingvoj – kaj kio daŭre vivtenas, animas ĝin? La respondo: idealismo, t.e. la Interna Ideo.

“Sed Esperanto estas nur lingvo, ĉu ne?”, oni foje aŭdas. Nu, jes ĝi estas lingvo kaj por iuj ĝi povas esti nur lingvo laŭ nur plej strikta difino, nome, kiel simpla komunikilo kaj ne ankaŭ portanto de kulturo. Certe iu ajn rajtas uzi Esperanton por kiu ajn celo, ĉar la lingvo apartenas al la tuta homaro. Eĉ nazioj povus uzi Esperanton por elbuŝigi siajn ficelojn. Sed tiu simpla uzo de la lingvo ne signifas ke ili partoprenas en la kulturo, en la spirito de la lingvo – kaj certe ne meritis la nomon “esperantisto”. Kaj por iuj Esperanto povas esti simple interesa lingva kuriozaĵo kaj nenio plu.

Sed ĉu lingva hobieco aŭ simpla praktika utileco sufiĉas por inspiri kaj vivteni la Esperanto-movadon? Nun, prave, estas certe nemalmultaj homoj kiuj lernas Esperanton nur el lingva intereso aŭ eventuale por vojaĝi per Pasporta Servo. Kaj ja nenio malbonas pri tio – mi mem originale



WWW.INTERNATIONALDAYOFPEACE.ORG

La Interna Ideo: ĉu ankoraŭ grava?

lernis el lingva intereso. Sed verŝajne ne ekzistus Esperanto-movado nun sen la idealisma ideo malantaŭ la lingvo – kaj sen tutmonda Esperanto-movado oni ne povus ĝui la praktikajn avantaĝojn kiuj nun haveblas. En la frua tempo oni devis batali por granda idealo, sen atendi ajnan praktikan profiton kaj sen ĝui la avantaĝojn kiujn ni nun ĝuas. Do, la simpla fakto ke ni havas Pasportan Servon, kongresojn, literaturon ŝuldiĝas al la sindonemaj klopodoj, kaj eĉ suferoj, de niaj antaŭuloj.

Ni iom konsideru la laboron, la oferojn kaj la suferojn de niaj pli fruaj samideanoj inspiritaj de la idealoj de mondpaco, homfrateco kaj reciproka interkompreno. Plej frue estis D-ro Zamenhof. Kiel knabeto en multlingva, multgenta Bialistoko li vidis la rezultojn de intergenta malamo kaj malfido ĉiutage – tio inspiris lin krei lingvon kiu povos formi la fundamenton por unuiginta homaro, por mondo sen muroj. Sed

naskado kaj vivigado de tiu lingvo prezentis proprajn malfacilaĵojn.

La gezamenhofoj devis elspezi grandan parton de sia havaĵo nur por eldoni la *Unuan Libron*, nesciante ĉu la lingvo sukcesos aŭ estos ignorata. Kaj dum la cetero de sia vivo D-ro Zamenhof devis dediĉi sian tutan libertempon al la disvolvado kaj defendado de la lingvo kaj ĝiaj idealoj. Poste estis la multaj samideanoj kiuj estis persekutataj sub Hitlero, Stalino kaj Mao... Kaj ne forgesu la multegajn samideanojn kiuj dediĉis siajn tempon, monon, energion kaj vivon por konstrui la Esperantajn movadon kaj komunumon kiujn ni ĝuas hodiaŭ. Ĉu oni laboregas, klopodegas kaj, jes, eĉ suferegas por lingva hobio aŭ por praktika komerca lingvo? Nu, mi certe ne farus, kaj mi dubas ĉu iu homo farus. Sed oni ja povas fari ĉion ĉi por granda, laŭdinda idealo – kaj estas tiu idealo de homa frateco kaj mondpaco kiu sub-

WIKIPEDIO



tenis niajn persekutatajn antaŭulojn eĉ en la plej mallumaj tempoj.

Mi iom pli frue menciis ke mi eklernis Esperanton el lingva intereso. Eble mi iom priskribu mian sperton por ilustru la povon de la Interna Ideo. Mi trovis Esperanton, kvazaŭ hazarde, en lingva enciklopedio kiun mi ricevis kiel kristnaskan donacon. La simpleco kaj logikeco de la lingvo tre plaĉis al mi (mi jam havis ĝeneralan lingvan intereson, sed ofte sentis malkontenton pri la mallogikeco kaj malfacileco de multaj lingvoj). Mi decidis esplori plu. Mi sukcesis trovi *Teach Yourself Esperanto* (unusolan ekzempleron) en loka librovendejo (mi aldonas tiujn ĉi detalojn pro tio ke la sinsekvo de eventoj originale aspektis iom hazarda, sed je retrorigardo ŝajnas ke la afero eble ne disvolviĝis tiom hazarde).

Mi eklernis kaj baldaŭ trovis min sorĉita de tiu ĉi magia, belega lingvo. Dum mi progresis en la lernado mi ankaŭ ekkonis la idealan fonon de la lingvo. Ju pli mi lernis pri la grandaj klopodoj, sinoferoj, sango, ŝvito kaj larmoj kiuj eniris la kreadon kaj disvolvadon de tiu ĉi mirinda lingvo, mi des pli sentis ke la idealoj de Esperanto ektransformas min – por bono! Mi antaŭe ne multe interesiĝis, aŭ eĉ multe pensis, pri mondopaco, homfrateco kaj tutmonda solidareco – efektive mi povas diri ke ĝis tiam mi estis sufiĉe konservativa (tute male de nun!). Do, mi vere povas diri ke Esperanto *ŝanĝis mian vivon* kaj turnis min al pli bona vojo. Ĉu nura lingvo povus realigi tiun ŝanĝon? Ĉu mi restus aktiva esperantisto dum tiom da jaroj nur pro lingva intereso?

Vere, mi eklernis la lingvon pro lingva scivolemo – sed mi restis, kaj restas, esperantisto pro idealismo, pro la Interna Ideo.

Estas klare ke la Esperanto-movado ne ekzistus hodiaŭ sen la subkuŝanta Interna Ideo – do, forta idealismo estas certe grava parto de nia pasinteco. Sed kio pri la nun? Kio pri la estonteco? Mi pensas ke la Interna Ideo pli gravas por la Esperanto-movado nun pli ol antaŭ 120 jaroj – efektive, pli grave, la baza penso de la Interna Ideo gravas *por la mondo* pli ol iam ajn antaŭe.

Ni konsideru la originalajn celojn de la Interna Ideo: mondopaco, internacia, interpopola, intergenta, interreligia frateco kaj interkompreno, faligo de la “muroj de miljaroj” kiuj dividas la homaron. Ĉu ĉio ĉi realiĝis por la homaro ekde la tempo de Zamenhof? Evidente ne. Sufiĉas nur rigardi la ĉiutagajn novaĵojn: malamo kaj malfido inter anoj de tiu kaj jena religio; timo ĉe jena homgrupo al anoj de alia; teroratakoj kaj venĝoj; kreskado de la breĉego inter riĉuloj kaj malriĉuloj, inter riĉaj kaj malriĉaj landoj; persekutoj kontraŭ minoritatoj kaj etna “purigado”... Certe la mondo multe ŝanĝiĝis ekde la tempo de Zamenhof – multaj tiutempaj problemoj intertempe solviĝis... dum novaj intertempe leviĝis. Nur pripensu ke ekde la tempo de Zamenhof la homaro travivis du mondmilitojn, unu el kiuj akompanita de kontraŭhomaj krimoj neniam antaŭe viditaj, la Malvarma Milito kaj nun la t.n. “Milito kontraŭ Terorismo”... Ĉu en tia mondo la Interna Ideo ne plu gravas?!

La Interna Ideo estas esenca parto de Esperanta kulturo, eĉ fundamento de la Esperanto-movado. Sen ĝi nia tuta agado – ĉiuj niaj organizoj, niaj kongresoj, niaj klopodoj – aspektus bagatelaj. Homoj pretas oferi sin por granda,

nobla ideo – sed ne por lingva amuzilo aŭ oportuna vojaĝolingvo. Kaj ja la *unikeco* de Esperanto ne estas ĝia facileco kaj lingvistika perfekteco – ja ekzistas aliaj planlingvoj kiuj taŭgas ĉirilate – aŭ ĝia praktikeco por vojaĝoj – ja la angla pli utilas ĉi-momente por vojaĝi. La unikeco de Esperanto estas la idealoj kiuj ĝin naskis, kiuj ĝin subtenas, kiuj ĝin animas.

Se ni deziras ke nia Movado restu valida nun kaj en la estonteco, ni ne povas distancigi nin de la Interna Ideo – ni devas ĉirkaŭbraki ĝin. Ni ne flankenŝovu ĝin kiam ni reklamas Esperanton, preferante menci i nur tiun kaj jenan praktikan utilon – ni portu la Internan Ideon kiel medalon de honoro sur niaj brustoj. Ni ne aspektu al la mondo kiel margena aro de lingvaj hobiuloj – ni montriĝu homoj de bona volo, inspirataj de noblaj idealoj – idealoj kiuj ne estas nuraj abstraktaĵoj, sed kiuj necesas por la bonfarto, eĉ pluekzisto, de la homaro. Ni montru al la mondo ke esperantistoj strebas por pli bona mondo – mondo pli paca, pli frateca, pli egaleca kaj pli unueca!

La Interna Ideo bone portis Esperanton jam dum 120 jaroj – kaj, se ni permesos, ĝi portos nin al bela estonteco... *ĝis la bela sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos!*

WIKIPEDIO



Zamenhof ĉe sia labortablo

Bill Harris

‘La Interna Ideo’ ne signifas la samon por ĉiu esperantisto. Kiom da kapoj, tiom da difinoj. Mi difinas ĝin jene:

1. Ne antaŭjuĝu homojn laŭ raso, religio, aŭ etna grupo. Juĝu ilin laŭ iliaj personaj agoj. Tiel vi kontribuas al egalaj kaj justaj interrilatoj interkulturaj.

2. Ne juĝu la pravecon aŭ ĝustecon de kulturaj kutimoj (inkluze de religiaj kredoj). Praveco kaj ĝusteco ne estas absolutaj.

3. Kiam vi interrilatas kun homoj el aliaj kulturoj, toleru la malsamecojn kaj trovu neŭtralan grundon laŭnecese. Lingve, ‘neŭtrala fundamento’ signifas Esperanton.

Rimarku ke ĉi tiu estas idealisma celo; kio signifas, ke ĝi ne estas facile atingebla, tamen oni strebu atingi ĝin kiel eble plej multe.

La juna Zamenhof spertis, in Bialystok, ke manko de komuna lingvo estas granda obstaklo kontraŭ la celoj de la Interna Ideo, kaj pro tio, li komencis ellabori lingvon neŭtralan kiu finfine estis Esperanto. La Interna Ideo ludis gravan rolon en la fruaj jaroj de la Esperantomovado en Eŭropo – Esperanto allogis homojn per la promeso de finfina paco kaj amikeco inter popoloj. Tamen, post la Unua Mondmilito (kaj la morto de Zamenhof), homoj kiuj sopiris al paco kaj mondamikado komencis kredi, ke la Ligo de Nacioj, kaj poste la Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO, atingos ĉi tiujn celojn. Samtempe, multaj eminentaj esperantistoj taksis la Internan Ideon de Zamenhof iom naiva, kaj pli kaj pli klopodis plibonigi la lingvon kaj pligrandigi la literaturon Esperantan anstataŭ varbi homojn al Esperanto.

Dum tiuj jaroj la Interna Ideo neniam malaperis. La nocioj ‘gefrateco de homoj’ aŭ ‘samideano’ aŭ ‘rondo familia’, nun aspektas malnovaj kaj gurditaj, sed la baza koncepto restis kaj restas – uzo de neŭtrala dua lingvo por interkultura komunikado necesas (eĉ se ne sufiĉas) por egalaj, justaj interkulturaj rilatoj. Plue, egalaj, justaj interkulturaj rilatoj necesas (eĉ se ne sufiĉas) por paco en la mondo. La plejparto de ordinaraj esperantistoj estis konvinkitaj pri tio, eĉ se ili nek havis la ĝustajn vortojn esprimi ĝin nek havis aŭdantaron aŭskulti ĝin.



Tradicia transdono de la flago al la posta LKK: maldekstre ĉina delegacio, dekstre sveda LKK-prezidanto (Gotenburgo 2003)

“La Interna Ideo de Esperanto: “Lingve, ‘neŭtrala fundamento’ signifas Esperanton”

Dum la 80-aj jaroj, la Manifesto de Raŭmo estis publikigita. Komenciĝis granda debato inter finvenkistoj kaj raŭmistoj. La ekstrema finvenkisto faras nenion pri Esperanto krom reklami kaj propagandi ĝin. La ekstrema raŭmisto ĝuas la etoson de la Esperanta komunumo (t.e. renkontiĝojn, literaturon) kaj faras nenion por disvastigi la lingvon al la ekstera mondo.

Unue, mi devas rimarki, ke nek finvenkismo nek raŭmismo traktas la Internan Ideon de Esperanto. Se venus la Fina Venko, ne plu estus finvenkistoj, ĉar reklamado kaj propagando estus sensencaj. Tamen, la Interna Ideo restus ĝusta kaj vera. Aliflanke, se mi estus la sola esperantisto en la mondo, ne plu estus raŭmistoj, ĉar ne estus Esperanto-komunumo. Tamen, la Interna Ideo restus ĝusta kaj vera.

Due, la individua esperantisto estas plejparte finvenkisto aŭ raŭmisto depende de personecaj trajtoj, Esperanta sperto ktp. Teoriaj debatoj ŝanĝos nenion.

Trie, tradiciaj Esperanto-organizaĵoj (ekz. UEA, Esperanto-USA) ekzistas por disvastigi Esperanton al la ekstera mondo. Tiaj organizaĵoj devas decidi kiel trakti la Internan Ideon en propagando. Tio estas komplika temo – eble mi traktos ĝin en venonta artikolo.

Pensoj de Zamenhof: “Patriotismo”

“La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokecon kaj fratecon inter la popoloj, kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensogo, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! ... La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultos; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo – tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, ni-graj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton “amo”, ĉar en via buŝo la sankta vorto “amo” malpurigigas”. (Originala Verkaro, p. 382; el el la *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*).



J. AMIS

Filipo Dorcas

Julio, 1973

Noktis. En la aero super Vjetnamio. Mi vidis la militon de nia aviadilo C-130. Sube eksplodoj, grandaj ka multaj, lumigis la nefeliĉan mondon.

Risko. Alproksimiĝis tri rusaj ĉasaviadiloj, Mig-23 laŭ la urĝa radioreportho. Ili forte deziris ataki nin. Tie kun mi sidis kelkaj kapitanoj, du koloneloj, unu generalo, kaj kelkaj aliaj gravuloj. Mi estis Kapitano Dorcas. Mi navigis la aviadilon. Ni estis la fluganta ordo-bazo, la en-aera reganta oficejo por la milito. Ni faris decidojn pri la milito, krom tiujn kiuj venis rekte de S-ro Nixon en la Blanka Domo en Vaŝingtono. Nia aviadilo havis en ĝi kvardek tri radiojn. Ni komunikas kun multaj aliaj aviadiloj, kun la surteraj oficiroj, kun aliaj oficejoj, kaj kun la Blanka Domo.

Ni sukcesis eskapi atakojn de la ĉasaviadiloj, kaj revenis senprobleme al nia flughaveno. Plia punkto en la milito.

“Ni, la esperantistoj, havas bonan ilon por plibonigi la mondon”

“Kiam venos la fino de la milito? Ĉu ekzistas espero? Kiam ekzistos espero?” La demandoj turniĝis en la laca cerbo.

Majo, 1974

Mia fina tago en la aerarmeo alvenis. Mi sidis en oficejo de iu serĝento. “Kapitano, ĉu vi volas havi viajn medalojn nun, aŭ dum la ceremonio?”

“Dum la ceremonio,” mi respondis. Tie surtable kuŝis kelkaj arĝentaj steloj, unu distinga fluganta kruco kaj aliaj honorajoj. Mi volis ricevi ilin antaŭ mia tuta grupo en mia fina tago, sed tiu ceremonio ne okazis. Ĉu iu iam donos al mi iom da honoro pro mia servo dum la milito? Ĉu iu dankos min? Ŝajnas ke ne. Ili malhonoris min ĉe la flughaveno kiam mi alvenis al Usono. Ili kraĉis al mi kaj diris malkuraĝigajn vortojn al mi pro mia partopreno en la milito. Sed... ĉu mi vere estas militistema viro? Iam antaŭe, ne. Sed nun?

Januaro, 1998

Mi trovis Esperanton interrete, ne tute hazarde. Iu metis la semon tridek jarojn antaŭe per intervjuo kun esperantisto en NPR-radioprogramo. Post la malkovro, mi renkontis la lokan grupon, kaj ankaŭ eksciis ke Esperanto estas ne nur lingvo. Esperanto estas tutmonda grupo de amikoj, kiuj amikiĝis per neŭtrala lingvo. Miaj amikoj en Dalaso montris al mi ke la lingvo servas kiel ponto al aliaj landoj kaj kulturoj. Nia amiko en Rusio aperas kiel vera, proksima amiko, kaj ne kiel iu kiun mi ne komprenas.

Jes, ni havas amikojn eĉ en Rusio, la lando kiu kreis la malamikajn aviadilojn kiuj ĉasis min antaŭ multaj jaroj.

Novembro, 2007

Finfine, mi ricevis honoron pro miaj jaroj de servado en la aerarmeo. Mi sidis en lerneja aŭditorio kun aliaj militaj veteranoj. Iu vokis mian nomon. Mi staris. Ili priskribis mallonge miajn jarojn de servado. Studentoj ekstaris kaj aplaudis. Venis prelegoj pri militoj, pri tio kiel bonaj estas niaj armeoj, niaj aviadiloj, nia forteco por defendi la landon.

Studentoj staris kaj prezentis la kvanton da soldatoj kiuj mortis en la diversaj militoj. Multaj homoj perdis la vivon, sed ili menciis nur la usonajn vivojn. Venis fotoj kaj filmoj pri militoj. Multaj aplaudis. Mi sidis. Mi ne protestis, sed pensis tre malfeliĉe. Kion la studentoj lernas? – ke milito estas solvo? – ke lerni pri armiloj estas la plej grava leciono? – ke ni fortigu la barilojn inter ni kaj aliaj landoj? – ke ni malpermesu interŝanĝojn kun aliaj kulturoj?

Kiel mi povas informi ilin pri internacia amikeco? Kion mi, unu homo, povas fari? Kiom da mono... kiom da miliardoj da dolaroj Usono elspezas por milito? Kontraŭ kiom por paco?

Ni, la esperantistoj, havas bonan ilon por plibonigi la mondon. Tiu ilo estas Esperanto, la lingvo de internacia amikeco, la lingvo de interkompreno, la neŭtrala lingvo kies Interna Ideo estas por helpi la mondon!

Kial Mi Studas Esperanton

Robert Read

Fascinas min la demando: ĉu la homaro regas sian propran sorton? Ĉu ni ĉiuj estas nur pupoj movataj per povoj preter nia kompreno kaj ekster nia volo, aŭ ĉu ni aktive influas nian propran kaj aran sorton?

Ŝajnas al mi ke Esperanto estas kriterio por juĝi la respondon al tiu demando. Homoj lernas Esperanton pro diversaj kialoj: ekzerci la menson, renkonti homojn, kompreni lingvistikon, prepariĝi por studi aliajn lingvojn. Tamen, mi persone

ne dubas ke granda parto de la peno kaj elspezo de tempo por lerni Esperanton estas donaco al la homaro, aŭ al la Interna Ideo. Oni studas Esperanton, almenaŭ parte, por esti bona homo kaj plibonigi la mondon.

Mi estas finvenkisto – mi opinias ke Esperanto estos vaste konata internacia helplingvo je 2200 p.K. Tamen, mi ne esperas vivi ĝis tiam, kaj mi neniam estas certa pri io – do kial mi elspezas mian tempon por ĝi?

Estas mirinde ke ekzistas kvar mil libroj en Esperanto. Estas miraklo ke mi vespermanĝis kun uloj de ok landoj kaj povis in-

terkompreniĝi. Al mi persone valorigas ke mi povas paroli, malperfekte sed flue, per ne-denaska lingvo. Tamen, tiuj avantaĝoj ne plene egalas al mia elspezo de tempo.

Mi ne scias ĉu la eta peno de idealistoj povas stari kontraŭ la abunda avaro kaj malscio de tiuj kiuj verŝajne regas nian mondon. Tamen, ĉiu uzo de Esperanto estas pruveto ke ni rajtas esperi. Eĉ se la granda ideo de Esperanto forpasos, ĝi havas tiun valoron: eble infano en 2200 p.K. eksciis pri nia Movado kaj diros, “Ho, jen inspira noblegeco, ke ili tiom longe kaj sindone laboregis por plibonigi la mondon.”

La Interna Ideo de Esperanto

Ni petis la estraron kaj aliajn aktivajn esperantistojn de nia organizo respondi la jenajn demandojn: 1) Kion signifas la Interna Ideo al vi persone? 2) Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado? Se ne, kiel vi vidas la rolon de Esperanto por la estonteco? Kaj se jes, ĉu necesas aktualigi aŭ adapti la Internan Ideon al la nuna mondo, kaj se jes, kiel? 3) Ĉu vi opinias, ke la Interna Ideo havu rolon en la oficiala agado de nia organizo – Esperanto-USA?

akiras scion pri aŭ akcepton de la Interna Ideo nur per lernado de la lingvo, sed la sperto de komunikado kun aliaj esperantistoj iom post iom tiras onin al la koncepto.



Ron Glossop: “Ĉefa fokuso de la Esperanto-movado devus esti la instruado de Esperanto al infanoj”

- *Kion signifas la Interna Ideo al vi persone?*

Por mi la Interna Ideo estas tio ke ĉiuj ni homoj estas membroj de unu homa familio. Tial ni devus esti bonaj mondciĉivitanoj kaj devus kunlabori por la nuntempa kaj estonta bonfarto de la tuta homaro. Mi tre ŝatas la strofon de la kanto (kun la melodio “Frère Jacques) verkita por infanoj de Charlotte Kohrs: “Sur la tero, bela tero; loĝas ni, kantas ni; kune sur la tero, monda familio, famili’, famili’.”

- *Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado? Se ne, kiel vi vidas la rolon de Esperanto por la estonteco? Kaj se jes, ĉu necesas aktualigi aŭ adapti la Internan Ideon al la nuna mondo, kaj se jes, kiel?*

- Mi opinias ke la Interna Ideo ankoraŭ estas la kerna ideo por Esperanto kaj la Esperanta Movado. Efektive, mi opinias ke ĝi estas pli grava ol la ideo ke la tuta homa familio devas uzi la lingvon Esperanto (kio probable neniam okazos, sed al tio ni

ankoraŭ devus celi). La Interna Ideo restas la kerna ideo de la Esperanto-komunumo eĉ se ne multaj homoj fariĝas esperantistoj. Tute ne necesas aktualigi aŭ adapti (ŝanĝi) la Internan Ideon mem, sed necesas nur konstati ke la Interna Ideo estas pli grava ol la kvanto de homoj kiuj uzas la lingvon Esperanto.

Kiel multaj esperantistoj jam notis, se iu (ekzemple, Eŭropa Unio aŭ monda registaro) devigus ĉiujn homojn en granda komunumo uzi Esperanton, ni ne plu povus determini kiu estas vera *samideano*. Homoj devus uzi Esperanton ĉar ili entuziasmas pri la Interna Ideo, ne ĉar iu alia postulas tion. Tio *ne* signifas ke ni ne devus instrui Esperanton al infanoj. Efektive ni devus devigi infanojn lerni Esperanton por ke ili povu iom pli facile fariĝi membroj de la Esperanto-komunumo *se ili volus* (kaj ankaŭ ĉar Esperanto helpas al ili lerni aliajn lingvojn). Se homoj ne lernas Esperanton dum infanaĝo, ofte estas iom malfacile lerni ĝin poste. Sekve, eble ĉefa fokuso de la Esperanto-movado devus esti la instruado de Esperanto al infanoj ĉirkaŭ la mondo.

- *Ĉu vi opinias, ke la Interna Ideo havu rolon en la oficiala agado de nia organizo – Esperanto-USA?*

- Mi ne komprenas la demandon ĉar mi opinias ke la Interna Ideo jam havas kernan rolon en la landa Movado same kiel en la tutmonda Movado. Eble estas alia instigo por kelkaj homoj, sed mia opinio la ĉefa instigo por multaj homoj lerni Esperanton estas la Interna Ideo. Kiel mi diris en la antaŭa alineo, ĉefa fokuso de la Esperanto-movado (inkluzive en Usono) devus esti la instruado de Esperanto al infanoj. Ronald Glossop estas Direktoro de la projekto Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo <<http://www.icxlm.org>>



Thomas Alexander: “Ne eblas apartigi la Internan Ideon disde Esperanto”

- *Kion signifas la Interna Ideo al vi persone?*

- La Interna Ideo estas interkompreno pere de neŭtrala helplingvo.

- *Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado? Se ne, kiel vi vidas la rolon de Esperanto por la estonteco? Kaj se jes, ĉu necesas aktualigi aŭ adapti la Internan Ideon al la nuna mondo, kaj se jes, kiel?*

- Ne eblas apartigi la Internan Ideon disde Esperanto. Certe ĝi gravas.

- *Ĉu vi opinias, ke la Interna Ideo havu rolon en la oficiala agado de nia organizo – Esperanto-USA?*

- Kompreneble, kaj ĝi jam havas, ĉu ne?

Enrike Ellemberg: “Eĉ ene de la esperantistaro ne ĉio estas glata...”

- *Kion signifas la Interna Ideo al vi persone?*

- Zamenhof kaj multaj esperantistoj kredis/kredas ke la tuta mondo devas formi unu solan familion, en kiu ĉiuj same kunlaboras por la bono de ĉiuj. En nia mondo tio ne okazas, kaj bona internacia lingvo utilos nur por montri la diversajn pensmanierojn.

- *Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado?*

- Mi kredas ke la Interna Ideo



Vilĉjo Harmon: “La Interna Ideo estas pure logika rimedo por disvastigi pacon sur la tero”

- *Kion signifas la Interna Ideo al vi persone?*

- La Interna Ideo al mi signifas la celon de paco inter homoj kaj la nacioj de homoj per faciligo de interkomunikado inter ĉiuj homoj, sen ideologiismaj intervenoj kaj fonoj. La Interna Ideo ne estas dogmo aŭ iu elĉiela ordono de iu nespecifado; ĝi estas pure logika rimedo por disvastigi pacon sur la tero.

- *Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado? Se ne, kiel vi vidas la rolon de Esperanto por la estonteco? Kaj se jes, ĉu necesas aktualigi aŭ adapti la Internan Ideon al la nuna mondo, kaj se jes, kiel?*

- Laŭ mi, oni ne aŭtomate



ne estas parto de Esperanto, sed de Zamenhof kaj multaj esperantistoj.

- Se ne, kiel vi vidas la rolon de Esperanto por la estonteco?

- Esperanto estas lingvo. Lingvo estas komunikilo. Precipe ĝi estas ilo. La celo de iloj ne ĉiam kongruas kun la ilo mem, sed kun la uzanto de la ilo. La plejmulto de iloj povas esti uzataj por bono kaj por malbono. Esperanto estu la komunikilo kiu permesus al la tuta mondo interkomunikiĝi.

- Kaj se jes, ĉu necesas aktualigi aŭ adapti la Internan Ideon al la nuna mondo, kaj se jes, kiel?

- Ĉu ideon oni povas ŝanĝi? Eble oni kreas novajn ideojn. Nia konata Interna Ideo naskiĝis en la menso de Zamenhof. Ĝi ne povas esti parto de lingvo. Multaj esperantistoj konsentas kun la Interna Ideo, sed eĉ ene de la esperantistaro ne ĉio estas glata... Eble oni povas krei lingvon en kiu ekzistas neniu vorto rilata al malbono. Bedaŭrinde, la uzantoj aldonos la mankantajn vortojn.

- Ĉu vi opinias ke la Interna Ideo havu rolon en la oficiala agado de nia organizo - Esperanto-USA?

- Prefere ne.

Doroteo Holland: "Atingado de justeco plej ofte implikas politikan agadon kiu povus kaŭzi gravajn skismojn inter esperantistoj"

- Kion signifas la Interna Ideo al vi persone?

- Kiel bazon de miaj respondoj mi uzos la jenan difinon de Zamenhof: "Esperanto estas ne nur lingvo, sed frateco kaj

justeco inter la popoloj".

Kiam mi unue renkontis Esperanton, la lingvo mem fascinis min, kaj la lernolibro kiun mi uzis (de Ivy Kellerman Reed) traktis nur la gramatikon. Nur post kiam mi komencis akiri korespondamikojn kaj



ĉeesti kunvenojn, mi ekkonstatas ke fakte Esperanto ja estas "pli ol lingvo". Kaj tio eĉ pli ĝojigis min, ĉar ĝi akordiĝis kun mia sento ke mi estas civitano de la mondo, kaj tial gravas al mi "frateco kaj justeco inter la popoloj".

- Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado? Se ne, kiel vi vidas la rolon de Esperanto por la estonteco? Kaj se jes, ĉu necesas aktualigi aŭ adapti la Internan Ideon al la nuna mondo, kaj se jes, kiel?

- Mi opinias ke almenaŭ parto de la Interna Ideo ankoraŭ gravas por la Esperanto-movado - tiu pri "frateco". Ekzemploj de ĝia jama apliko estas Pasporta Servo; lokaj, regionaj kaj internaciaj kunvenoj kaj kongresoj; korespond-amikoj; kaj la fondaĵoj de UEA kaj de Esperanto-USA kiuj helpas al malriĉaj esperantistoj.

Sed pri "justeco" mi ne certas, ĉar ties signifo varias laŭ homo, lando kaj kulturo, krom se oni akceptas la difinojn en la "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj" de la Unuiĝintaj Nacioj. Cetere, atingado de justeco plej ofte implikas politikan agadon kiu povus kaŭzi gravajn skismojn inter esperantistoj. Ekzemple, laŭ la difino

de la Interna Ideo el Enciklopedio de Esperanto, "E estas ... amata de siaj adeptoj, speciale de tiuj, kiuj E-n konsideras grava faktoro por forigi la militon el la homa socio". Do nuntempe en Usono estas grava debato pri la milito en Irako. Miaopinie ne estus saĝe ke Esperanto-USA eniru tiun debaton, kvankam unuopaj esperantistoj certe rajtas.

- Ĉu vi opinias, ke la Interna Ideo havu rolon en la oficiala agado de nia organizo - Esperanto-USA?

- Kiel mi jam menciis, ŝajnas al mi ke "frateco" jam rolas ĉe Esperanto-USA. Sed, eble valorus pli intensigi niajn agadojn pri lokaj kaj regionaj kunvenoj kaj pri kontribuoj al niaj fondaĵoj. Krome, eble ni povus iel kunlabori kun esperantistoj en aliaj landoj - ekzemple, publikigi en nia organo artikolojn pri iliaj solvoj de tiaj problemoj, kiel allogi gejunulojn, kiel starigi kursojn ktp. Kaj eble valorus meti en nian organon personajn raportojn pri kontaktoj (ĉu per korespondado, konatiĝo dum UK, partopreno en Pasporta Servo ktp.) kun alilandaj esperantistoj.

Elizabeto Magallón: "Iu ajn lingvo per si mem ne regas la korojn de homoj"

- Mi ne tute certas kio estas la "Interna Ideo", sed mi feliĉe komentas pri Esperanto. Ni, kiuj uzas Esperanton aŭ deziras lerni Esperanton, kutime havas deziron transpasi la obstaklojn inter homoj, kaj kompreneble "nia" kara lingvo faciligas tion.

Iuj, kiuj uzas Esperanton, uzas ĝin por ne decaj aferoj, sed tio montras ke Esperanto estas vivanta lingvo. Iu ajn lingvo per si mem ne regas la korojn de homoj. Homoj riproĉadas kaj vundas unu la alian per vortoj esprimataj malafable sendistinge de la lingvo uzata. Ŝanĝoj en la koroj de homoj okazas, sed Io aŭ Iu pli granda ol lingvo estas Tiu, Kiu ŝanĝas la korojn.



La lingvo ne havas la povon fari tion. Ĝi povas multe helpi, sed ĝi ne havas la povon en si mem por plenumi tiun deziron, sen bonkora pensmaniero de la homo kiu uzas ĝin.

Por mi, uzi Esperanton ĉiutage estas stilo de vivo. Kiel oni uzas ĝin, por tio kio helpas aŭ tio kio malhelpas, tio dependas de la koro, menso kaj animo de la homo kiu uzas ĝin. La lingvo estas ilo, ne estro.

Julie Spickler: "Ni devus pli emfazi la ekziston kaj signifon de la Interna Ideo al nia aktuala mondo"

- Kion signifas la Interna Ideo al vi persone?

- La Interna Ideo estas la baza temo de la tuta projekto de la Internacia Lingvo, la fundamenta kialo. Ĝi signifas ke la homaro estas unu grupo, ke la similecoj de homoj estas pli gravaj ol la malsimilecoj, ke ni ĉiuj havas la samajn bezonojn kaj dezirojn, kaj ke ni deziras komunikiĝi unu kun la alia(j).

- Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado? Se ne, kiel vi vidas la rolon de Esperanto por la estonteco? Kaj se jes, ĉu necesas aktualigi aŭ adapti la



Internan Ideon al la nuna mondo, kaj se jes, kiel?

- Jes, la Interna Ideo certe gravas por Esperanto kaj la Movado; ne necesas adapti ĝin, sed ni devus pli emfazi la ekziston kaj signifon de la Interna Ideo al nia aktuala mondo.

- **Ĉu vi opinias, ke la Interna Ideo havu rolon en la oficiala agado de nia organizo – Esperanto-USA?**

- JES – kaj estus bonege pli emfazi ĝin.

Lusi Harmon: “Mi estis esperantisto eĉ antaŭ ol mi aŭdis pri la lingvo”

- **Kion signifas la Interna Ideo al vi persone?**

- Mi unue citu klarigon de dro Zamenhof: “La Interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la esperantaj kongresoj, estas: ‘sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkitimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimumo nur homon kaj fraton.’”

Evidentiĝis al mi ke mi estis esperantisto eĉ antaŭ ol mi aŭdis pri la lingvo, same kiel Humphrey Tonkin diris dum ELNA-kongreso. (Dum ELNA kongreso en Bostono Humphrey Tonkin prelegis kaj menciis ke li



jam estis esperantisto en la koro antaŭ ol li aŭdis pri la lingvo.) Ĝi estas ilo kiu promesis al mi pli grandskale kompreni individuojn kiel homojn kaj fratojn. Pro tio mi povas diskuti neŭtrale pri preskaŭ ĉio ankaŭ kun ne sampensantaj homoj. Rezulte, mi havas multajn intimajn eksterlandajn amikojn. Sen nia neŭtrala lingvo kaj la deziro kompreni, ni ne povas akcepti unu la aliajn kaj vere interkompreniĝi. Esperanto ege grandigis mian vivon.

- **Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado?**

- KOMPREENBLE JES.

- **Ĉi vi opinias, ke la la Interna Ideo havu rolon en la oficiala agado de nia organizo – Esperanto USA?**

- Nia statuto enhavas du frazojn kiuj rilatas al ĉi tiu temo: “... The League is part of the worldwide movement to spread the use of ... Esperanto, thereby advancing friendly relations

among all the peoples of the world.” And, “The League is and shall forever remain neutral concerning questions of religion, politics, and socio-economic theory.” Do la Interna Ideo jam havas rolon en la oficiala agado de Esperanto-USA. (Tio ne signifas ke ni esperantistoj ne havu opinion aŭ ne esprimu ilin, sed ke ni ne faru ilin KIEL esperantistoj.)

La grupo “Terpomuloj” (<http://www.terpomuloj.org>): “Sen la Interna Ideo, Esperanto ne ekzistus”

- **Kion signifas la Interna Ideo al vi persone?**

- La Interna Ideo por ni estas la egaleco inter homoj – egaleco, kion Esperanto ebligas inter homoj kiuj parolas malsimilaj lingvoj. Sen la Interna Ideo Esperanto ne ekzistus.

“Mi iam rete parolis kun iu el Hungario kaj mi forgesadis, ke ni ne parolas angle. Mi ekkonsciis ke la angla lingvo estas nur ilo – same kiel Esperanto! Mi neniam antaŭe pensis pri la angla tiel: mi neniam antaŭe konsideris mian vivon aparte de la lingvo. Frapis min la egaleco de inteparolado kun iu alia kiu same kiel mi lernis la ‘fremdan’ lingvon.”

- **Ĉu la Interna Ideo ankoraŭ gravas por Esperanto kaj la Movado? Se ne, kiel vi**

vidas la rolon de Esperanto por la estonteco? Kaj se jes, ĉu necesas aktualigi aŭ adapti la Internan Ideon al la nuna mondo, kaj se jes, kiel?

- La Interna Ideo ja ankoraŭ gravas, kiel ni jam diris en la respondo al la unua demando. Ni bezonas novajn ideojn por reklami Esperanton – uzante la fortojn de la reto. Multaj homoj lernas Esperanton per la reto kaj pretas uzi la lingvon. Ni devas krei okazojn por uzi ĝin. Ekzemple, starigi interpretistojn Esperantajn en grandaj internaciaj flughavenoj. Uzi Esperanton en komputilaj programoj kiel unu el la lingvaj elektoj. Oni bezonas kialon por instigi pli da homoj lerni Esperanton.

- **Ĉu vi opinias, ke la Interna Ideo havu rolon en la oficiala agado de nia organizo – Esperanto-USA?**

- Jes, la Interna Ideo estas la kerna ideo – la kialo por la ekzisto de la organizo. Ĝi estu parto de la misio de Esperanto-USA.

“Get it out of ‘1984’ and into ‘Grandma and cupcakes’.”

Estus bonege se Esperanto aperus en “Sesame Street” anstataŭ la hispana! Oni devas prizorgi, ke la publiko vidu la lingvon kiel gravan, veran lingvon: ne iun ludon aŭ bagatelajon.

Esperanto estu instrumento de interkompreno

Eŭgeno Perevertajlo <esperuzo@mail.ru>, Uzbekio

Mi serĉas homojn kaj agadsferojn kie Esperanto povas esti necesa. Esperanto neniam floras, se ĝi restos nur “la lingvo de amikeco kaj paco”. Ĝi devas esti instrumento de interkompreno en la internaciaj rilatoj, kiuj povas esti utilaj ekonomie aŭ en aliaj sferoj, utiligata, ekzemple, propedeŭtike. Pri tio malofte oni parolas rete, revue, bultene aŭ kongrese. Bedaŭrinde!

Al kiu ni propagandas pri Esperanto kaj aranĝas E-kursojn? Al ĉiuj. Kiuj al ni venas? Al ni venas scivolemuloj kiuj aplikas Esperanton en kampoj malproksimaj de la intereso de la ekstera mondo. Kie necesas paroli pri nia lingvo, al kiuj? Al tiuj kiuj povos

apliki, utligi Esperanton en sia profesia, mongajna laboro.

Se vi lernas fremdan lingvon por poste instrui ĝin aŭ (kaj) esti profesia tradukisto, vi nepre renkontos problemojn en tradukado (tre malfacilas tradukoj en la fremdan lingvon – tion scias la spertuloj) kaj kompreno de la necesaj tekstoj. Ekzemple, vi trovis ion netradukeblan. Kiu helpas al vi? Foje la vortaroj kaj kolegoj estas ekster tiu povo. Se vi konas Esperanton, la solvo estas facila – vi skribu vian lingvan problemon al esperantisto de tiu lando kie tiu lingvo estas denaska, oficiala, ĉiutaga. Tiu esperantisto facile helpas en la situacio. La helpo povas esti pagata aŭ amika, t.e. senpaga. Certe aperos tekstoj por plena tradukado de unu lingvo al la alia kun helpo de la pontolingvo, kiu povas esti Esperanto.

Oni scias ankaŭ kiel malfacila tasko estas lerni fremdan lingvon ĝis la necesa nivelo. El la praktiko – por lerni fremdan lingvon, oni bezonas jarojn – por lerni Esperanton kun la sama vervo oni bezonas monatojn. Esperanton oni povas lerni ĝis la nivelo de la denaska lingvo. Kial? – Ĉar oni ne simple lernas Esperanton, oni kreas ĝin en si. Ĉu vi ne imagas tion? – Provu! Nun niaj studentoj havas svagan imagon, scion pri tio, por kio estas necesa kono de Esperanto. La supra argumento estas pli ol trafa almenaŭ por iu certa tavolo de la homaro.

Samnaciaj, samlingvaj konantaj tre bone iun fremdan lingvon neniam interparolas inter si en la nedenska lingvo. Ili opinias, ili sentas malkomforton paroli en fremda lingvo. Esperantistoj eĉ samlingvaj kaj samnaciaj senpene interŝanĝas la pensojn en la lernita Esperanto! Foje oni trovas Esperanton pli preciza ol la denaska lingvo.

“Esperanto is a valuable and necessary tool to help the world become a better place”



STANO MARČEK

“The wealth of the friendships formed during those classes has been a vital part of my life ever since”

- How did you first hear about Esperanto? What motivated you to learn the language? Was idealism an important factor in your decision to learn Esperanto? When and how did you learn the language?

I first heard about Esperanto from my boyfriend, Bill Harmon (I met Bill outside of “Esperantujo”, but it was his Esperanto which convinced me to marry him – well, at least partly). I was not particularly interested in learning it because I always found language learning to be difficult. However, I soon noticed that Bill’s ideas about the world had been greatly broadened by his contacts with Esperantists, which made him more interesting to me as well. Also, I wanted to please him and so I undertook the study on my own from books such as “Step by Step” by Montague Butler. But soon thereafter I had the good fortune to study during the first years of what is now the three week course offered then during the summer in San Francisco. My first real teacher was William Auld. The second year that

he taught, I studied with him his epic poem, “La Infana Raso”. I don’t believe that I understood much of it, but I was really impressed that language could be used that way! And, of course, the wealth of the friendships formed during those classes has been a vital part of my life ever since.

- Was idealism an important issue?

Absolutely. I was idealistically an Esperantist even before I heard of the language. I could easily understand the need for a common second language for the world. It does not ensure that we understand each other; but learning it is proof of motivation to want to understand, and the language is a tool to make understanding possible.

“Without the personal contacts I have around the world, there is no way I could have or even wanted to travel as much as I have”

- You have been intensively active in the Esperanto Movement for many years now. What first motivated you to become active in the Esperanto Movement? What keeps you going, i.e. from where do you draw your strength and inspiration to keep “fighting the good fight”?

I always have been active in organizations which work for the things I believe in. I believe that Esperanto is a valuable and necessary tool to help the world become a better place for all to live. I also found that Esperanto was a very valuable tool to help me in my work as a travel agent as well as a teacher. Without the personal contacts I have around the world, there is no way I could have or even wanted to travel as much as I have – nor learned as much about organizing interesting group tours. As for “fighting the good fight” – it’s basically very interesting and often a whole lot of fun.

- A number of years before Pasporto you were involved in creating another ELNA video project, The World of Esperanto starring Steve Allen. How did this project unfold, and, the question everyone wants to ask: how were you able to get Steve Allen?

One day we received a telephone call from a woman who was preparing herself as a film maker. She and her partner saw a piece of literature in the local library about Esperanto, and “fell in love” with Zamenhof. They wanted to talk about writing a script about Esperanto, and this began a half year of Friday nights sitting together, thinking of what to say, how to say it, and how to get a well known person to be involved in a television interview. We thought of Steve Allen, who was an internationally minded person as well as a humorist. As it turned out, one of ELNA’s members, Bill Glenny, attended the same church. However, Mr. Glenny didn’t want to presume upon his acquaintance, but did give us Steve Allen’s studio contact. We edited the script to make Steve the interviewer. We got permission from his agent to read the script, and Steve agreed to film it in his office in Los Angeles, and even arranged for ELNA (in the person of Bill Harmon, then president of the League) to join the actor’s union for a day. We paid Steve minimum wage, and got a star’s performance. Bill Harmon was pretty good too.

“You should not fail to try something just because it is ‘audacious’”

- How did this experience prepare you for Pasporto?

What I learned from this experience is that you should not fail to try something just because it is “audacious”- or when your friends say you can never succeed. Make as good a plan as possible, and ask. Be prepared to adapt to the situation, count upon the marvelous help of fellow Esperantists, and try. The worse that can happen is that you receive no response or a polite “no”. An

J. AMIS



During board meeting (New York, 2006)

impolite “no” can give you clues about how to progress. Of course, you must be sure that what you are doing is really worthwhile and be able to convince those you need to help. But someone who at first strongly reacts negatively can be the best helper once you can deal with the complaints.

- In the early 70's you lived in Japan for a time – how did Esperanto connections make the adjustment easier?

- Without Esperanto contacts, life in Japan would have been entirely too stressful. Either you would have to live in the ex-patriot community and really remain a stranger in a strange land, or you had to move out of that community and make meaningful contacts with locals. Luckily Bill already knew some Esperantists who had visited San Francisco before we moved. They and the whole Tokyo Esperanto community welcomed us, and took advantage of the fact that we had a western-style house which was large enough to invite members of the local club for classes and parties.

“Do you know that in English you are a completely different person? And I’m not sure I like you!”

- How does the Esperanto Movement in Japan differ from the Esperanto Movement in the U.S.?

- Japan is as fundamentally different from the United States as any “first

world” country could be. I think it is really an exotic land, and the Movement differs from ours to the same extent the culture does. They have rules which need to be respected; patterns of behavior to cover most situations; and a great respect and appreciation for their own culture. They are very formal, but are able to make close friendships with “gaijin” (outside or foreign person). Also, the Japanese movement is very strong, with many more members than we have and more active. A comprehensive answer would take at least several pages. But I will report an anecdote which shows how Esperanto bridged that gap for us: A young talented Esperantist who had visited us often, having finished his studies as a simultaneous interpreter, asked Bill if he could come visit and practice his professional English and confirm some technical words involved in agriculture because he was to accompany a group of farmers to the U.S. After working for 2 or 3 hours, he turned to Bill and said, “Thank you for your help. But do you know that in English you are a completely different person? And I’m not sure I like you!” Polite to the end, but there is no way we could have become friends without our “bridge” language.

- Many Esperantists in North America (and even from other parts of the world) have benefited from your expertise as a travel agent through Esperanto Vojaĝ-Servo and the pre and post convention tours you’ve arranged. Was involvement

with Esperanto influential in your decision to become a professional travel agent? We know how you have helped Esperantists, but has Esperanto helped you in your professional life?

- Without Esperanto, I would never have traveled much. I love my home and do not like to feel out of control. But I felt completely out of control when we first moved to Japan, and without the help of Esperantists and daily help with buying and preparing strange food, having to pay large sums of Yen for gas, water, electricity when collectors came to the door – and other strange customs. Humiko was a college student and served as our daughter-maid. Without her Esperanto, I would have died. We even worked out a system to beat the workmen who came for repairs who had no respect for young girls or foreign women who couldn’t understand Japanese. And, yes, before I moved to Japan, I had little interest in changing my profession as a teacher to that of a travel agent.

- How would your life be different if you had never found Esperanto?

- Life, of course, would have been quite different without Esperanto. I’m optimistic enough to think that it would have been pretty good, but it couldn’t have been as rich and rewarding.

- Thank you very much for the interview!

Interviewed by Joel Amis

Respondoj al la krucvortenigmo de James Lieberman (publikigita en Esperanto USA 2007:3-4



La Pasporto al la Tuta Mondo

Mi konatiĝis kun la vidbenda kurso “Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo” – kaj tuj enamiĝis al ĝi! – jam post kiam mi alvenis al Usono kaj kiam ni komencis E-kurson en Atlanto printempe 2006. La “Pasporta” kurso ege plaĉis al niaj lernantoj, kaj tiel mi estis tre sukcesa, kaj mi povas rekomendi uzi ĝin al ĉiuj instruistoj. Mi ege ŝatis la fakton, ke ĝi ne eksmodiĝas pro sia “eklektikeco”, humureco kaj – jes! – humurplenaĵoj. Mi petis ke la “patrino” de la kurso, Lusi Harmon, rakontu pli pri ĝi!

- En kies kapo naskiĝis la ideo fari tiel grandegan kaj aŭdacan projekton?

- Mi provis trovi iun daton por rimarki kiam la ideo venis en mian kapon, sed mi ne povis trovi la komencon. Eble tio okazis kiam, dum mallonga periodo, ekzistis leĝo en Kalifornio ke en niaj elementaj lernejoj oni instruu fremdan lingvon. Tiu eksperimento, kompreneble, tute fiaskis pro la manko de instruistoj. Eble tio okazis kiam loka filmkreato kontaktis nin por fari videokurson pri Esperanto. Ni verkis la tekston por “The World of Esperanto with Steve Allen” (sistampe fama humoristo en

Usono) en 1972 kaj montris ĝin dum la UK en Portlando, Usono. Eble tio okazis kiam Audrey Childs Mee en 1989 venis por instrui somere dum nia kutima trise-majna kurso en San-Franciska Ŝtata Universitato. Ŝi estis fama pro la uzado de la “rekta” metodo, kaj estis la eblo filmi ŝin. Bedaŭrinde, ŝi subite mortis, kaj ni devis trovi alian formon de la “rekta” metodo. Post longa studo kaj provoj, ni decidis filmi daŭran rakonton pri la “aventuroj” de la familio Bonvolo. Por kolekti monon, ni faris reklam-videon kiu estis filmita, redaktita kaj montrita en 1996 en la Praga UK. Tiun version verkis Edwin Grobe.

- Kia estas la ideo malantaŭ la kurso? Estas ja tre nekutima familio – greka filozofa, dancistino, juĝisto, artisto, kuristo... Kial estas ĝuste tiel?

- Kiel respondi al tio? Do, la “familio” kaj vizitantoj spegulas la diversecon de esperantistoj. Ni fakte strebis kiel eble plej multe eskapi iun tipan familion, ĉar ni celis pli vastan montradon de Esperantio. Ni



Steve Wagenseller kaj Jianping Zhao el Radio Pekino kontrolante la ĉinajn subtitojn

ankaŭ alfrontis la fakton ke ni devas produkti kaj filmi la scenojn dum almenaŭ kvin jaroj. Ni rimarkis ke, ekz., en la kazo de *French in Action*, francilingva kurso por anglalingvanoj, la kostumoj jam eksmodiĝis. Do ni elektis rolulojn... kaj vestis ilin per kostumoj kiuj difinas la rolojn: greka “togo”, baleta dancjupeto, juĝista robo kaj peruko, artista kitelo, atleta vesto de kuristo.... La ĉefaj kostumoj ja ne eksmodiĝos! Ni celis ke la roluloj estu universalaj kaj havu iun... pretertempaĵon – tiel ke la lecionoj estu uzablaj sen ŝanĝoj dum multaj jaroj.

- Ĉu la originala ideo kaj fina rezulto estas pli-malpli samaj, aŭ ĉu ĝi transformiĝis dum la farado?

- La originala ideo estis krei rektmetodan kurson por elsendi ĝin televide – parte pro vera manko de instruistoj. Ja ekzistis diversaj fremdlingvaj televidaj kursoj: *French in Action* aŭ *Mazi in Gondoland* por instrui la anglan al infanoj – mi pristudis ilin por gajni pli da ideoj. Ni daŭre sekvis la bazan ideon, sed ni trovis ke ĉiu paŝo sugestis ideojn por pligrandigi ĝin. En la komenco ni celis nur vidbendan programon kiu povus

esti elsendata televide kaj esti uzata en la klasĉambroj aŭ individue. Tio postulis ke ni produktu ankaŭ skribitan tekston (kun tradukoj de la vortoj de la instruisto) kaj ekzercojn. Kaj kiam ni preskaŭ finis tion, evidentiĝis ke DVD-formato estus multe pli facile uzebla. Kiam ni konvertis la vidbendojn en DVD-ojn, ni komprenis ke estus relative facile aldoni subtitojn rekte sur la ekranon. Ni nun aldonas subtitojn de la vortoj de la instruisto en kiel eble plej multe da lingvoj. Tiu procezo daŭre stagnas... Ni nun havas subtitojn en kvin lingvoj kaj almenaŭ pliaj tri “survojas”. Ni fine celas havi almenaŭ 12 ĉefajn lingvojn – eble poste al tio aldoniĝos pliaj ok, kiu scias? La kosto de la kurso en DVD-formato estas malpli granda, kaj por produktado kaj por dissendado, ol la kosto de ĝi en la vidbenda formato.

- Kiu verkis la scenaron por la kurso?

- Kiam profesoro Grobe devis rezigni post la kreado de la reklamvideo, ni estis tre feliĉaj trovi d-ron Paul Gubbins kiu jam verkis lernolibron uzante tre ĉarman rakonton. Estis grandega plezuro labori kun tiu



Marjorie Boulton (dekstre) kun Diana Babeck Weichert spektantaj Pasporton

KOMPLEZE DE L.H.



Miko Sloper (la "patro"), Lusi Harmon (direktoro) kaj Steve Wagenseller (la "detektivo")

tre talenta aŭtoro! La ekzercojn verkis Stefan MacGill, la enkondukon al la metodo por la studentoj verkis d-ro Duncan Charters, kaj la DVD-igo estis farita de Diana Babeck Weichert (ŝi ankaŭ aldonas la subtitolojn). Subtitolojn en la angla plejparte faris mi kaj mia edzo, en la hispana – Enrique Ellemberg kaj Leonora Gonzales, en la franca – Normand Legaux. Tiu laboro estas tre malfacila, kaj ni daŭre invitas partoprenantojn!

- El kio fakte konsistas la kurso?

- La DVD-versio de la kurso konsistas el kvar DVD-oj kaj sur ĉiu disko estas po kvar duonhoraj lecionoj – entute proksimume ok horoj. Ankaŭ estas du KD-oj; unu entenas la tutan tekston de la dramo kaj la klarigojn de la gramatiko en la vortoj de la instruisto. La dua KD entenas ekzercojn por eĉ pli bone klarigi la enhavon de la dramo kaj gramatikon – proksimume 350 paĝoj. La plasta skatolo havas belan kovrilon kun fotoj el la dramo, kaj ĉiu disko havas tre buntan ektikedon. Ĝi aspektas kiel profesie farita kurso, kia ĝi ja estas.

- Kiu estas la celgrupo de la kurso kaj kiuj estas la aĉetantoj de la diskoj – ĉu individuoj aŭ tamen E-instruistoj, por siaj gelernantoj?

- La celgrupo de la komenco estis gejunuloj. Tamen, ni trovis ke ankaŭ infanoj kaj eĉ maljunuloj amas ĝin – krom se ili ne povas iom ridi pri kelkaj stultaj agoj kiujn ni esperantistoj faras. Ĝis nun ĉirkaŭ duono de la aĉetintoj estis instruistoj – ofte instruistoj aĉetas kromajn ekzemplerojn por la studentoj kiuj spektas la lecionojn hejme kaj uzas la klasperiodon por ekzercado.

- Rakontu iomete pri la celoj kaj la uzitaj metodoj en la kurso – ĝi ja ne nur instruas la lingvon sed ankaŭ donas sufiĉan superrigardon pri E-kulturo, ĉu ne?

- La celo, kompreneble, estas helpi nin "krei" esperantistojn pere de interesa rakonto kiu, jes, montras la avantaĝojn de nia lingvo. Ĝi baziĝas sur la plej lasta nuntempa metodo de la instruado de fremdaj lingvoj. La avantaĝo de tiu ĉi multflanka aliro estas ke ĝi simulas la specon de trempig-sperto kiu montriĝas plej efika por la lingvolernado. En "Pasporto" oni aŭdas Esperanton parolatan en la natura kunteksto, kun multe da vid-kaj situaciaj replikoj por faciligi la komprenadon de la signifo.

Aktualaj studoj pri lingvoakirado indikas ke la instigo de la studanto estas plej grava. La amuza intrigo havas daŭran "sap-operan" stilon kiu

tenos la intereson de la studentoj. La iom farsa stilo ne nur amuzas sed ankaŭ malstreĉas la spektanton kaj trankviligas la studenton pri ties propraj eraroj.

Dua elemento de la aktuala lingvoinstruata teorio insistas pri la graveco de la natura komunik-materialo. Ni uzas "real-vivajn" situaciojn en la vivo de la Familio Bonvolo. Konsentite, la familio kaj ĝiaj konatoj estas iom surrealaj, sed tre konindaj kaj ĝuindaj. La uzo de DVD-oj permesas al la instruisto aŭ studanto ripete spekti scenojn kaj elementojn por pli bone kompreni ilin.

- Kiu financis la projekton? Ĉu aktoroj ricevis ian pagon aŭ ĉu ili estas plene volontulaj?

- Bone, ne demandu kiom kostis aŭ finfine kostos la projekto. Ne nur aktoroj ne ricevis la pagon, sed ankaŭ ĉiu alia esperantisto kiu laboris, laboris pro amo al Esperanto. La kosto estas grandega ĉar ni uzis profesiulojn (neesperantistajn) por la filmado, trejnado, redaktado kaj ĉiu teknika flanko de la produktado (krom la DVD-igo kiun Diana Weichert studis kaj faris). Multaj el la partoprenantoj ne nur donis talenton kaj tempon, sed ankaŭ kontribuis monon. Se vi rigardos la nomojn fine de la lecionoj, vi vidos kiom da personoj kontribuis, plejparte anonime. Venis kontribuoj de la fondaĵo *Saliko* de UEA, la fondaĵo *Carson* el Kanado, la fondaĵo *FAME* el Germanio, kaj ankaŭ de multaj individuoj. Plejparte, tamen, la mono venis el la poŝoj de la ordinaraj esperantistoj en Usono kaj prunteprenoj de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. Kiam ni finfine ne plu povis peti monon de la individuoj, Esperantic Studies Foundation provizis nin per la lastaj bezonataj sumoj. Ĝis nun la projekto ne donas profiton, sed plejparte la men-

doj nun kovras la koston de la produktado.

- Kiom kostas la kurso? Ĉu la diskoj haveblas nun?

- Nun, jes, la DVD-oj kaj kodoj haveblas, kaj UEA vendas kontraŭ 90 eŭroj kaj Esperanto-USA vendas kontraŭ \$110.00. Ni jam disdonis aron da DVD-oj kaj KD-oj kontraŭ speciala rabatita prezo al instruistoj kiuj ne povas multon pagi. Kaj ankoraŭ restas iom de la originalaj videobendoj kiujn ni vendos kontraŭ kosto de la paperaj lecionoj kaj sendokosto.

Se vi volas kaj povas dediĉi multe da tempo, povas bone uzi komputilon kaj deziras ricevi la diskojn senpage, nepre kontakti min (LusiHarmon@aol.com). Ankaŭ se vi estas instruisto kaj ne povas pagi la tutan sumon, skribu al mi kion vi jam faras, kion vi planas fari kaj klarigi kial vi bezonas la kurson nun.

- Kiam la projekto estos finita?

- Ni planas finenmeti subtitolojn por la vortoj de la instruisto por kiel eble plej multe da lingvoj almenaŭ printempe 2008, kaj tiam produkti DVD-ojn uzablaj ie en la mondo. Ni ne plu bezonas regionajn kodojn ĉar ne eblas kopii la novajn pli bonkvalitajn DVD-ojn, kaj kiam ni produktos "amase", ili kostos eĉ malpli. Dum niaj someraj kongresoj, ni intencas oferti specialan prezon dum la kongresoj.

Intervjuis Ĵenja Amis

Zamenhof Lazaro Ludoviko

Zamenhof Lazaro Ludoviko

Prof. G. Waringhien (Francio)

Lia familio

Li devenis de juda familio, laŭdire elpelita el Hispanujo en 1492, kiu elmigris, en la komenco de la 19-a jarcento, el Bavarujo (eble el la vilaĝo Sam-Hof) al Tykocin (rusa Polujo), kie naskiĝis, la 27.I.1837, Samenhof Mordeĥaj Markus. Tiu ĉi, same kiel lia patro, fariĝis privata instruisto pri germana kaj franca lingvoj. Sed liaj ambicioj estis pli grandaj: en la industria urbo Białystok (Bjalistoko), kien li migris, li fariĝis pioniro de la klerisma movado, kiu celis ĉesigi la ritan apartismon kaj partoprenigi la judojn al la moderna kulturo; krome li difinis al si ŝtatan karieron, kiun li atingis, malgraŭ sia judeco, dank' al sia fera volo kaj al sia rusisma lojaleco. Tial li transloĝiĝis en decembro 1873 en la ĉefurbon Varsovio, kie li estis baldaŭ nomita instruisto pri germana lingvo en la "reala gimnazio". Li kronis tiun promocion elektiĝinte en 1878 regna cenzuristo super la hebrea kaj jidaj eldonaĵoj en Varsovio. Li estis pedanta homo, skrupulema, severmora kaj ŝparema; krom siaj oficialaj okupoj, li ankoraŭ trovis la tempon gvidi la studojn de kelkaj lernantoj, kiujn li pensionis. Li havis ok infanojn, kiujn li edukis etburĝe: el la kvar filoj, tri fariĝis medicinaj doktoroj kaj unu farmacia

VIKIPEDIO



— preskaŭ la solaj intelektaj karieroj malfermataj al la ruslandaj judoj.

Lia kariero

La plej aĝa filo estis naskita jam en Bjalistoko, la 15.XII.1859, kaj ricevis la hebrean nomon El'azar, transskribitan en la rusaj dokumentoj Lazar; laŭ la kutimo, oni aldonis duan kristanan antaŭnomon, kun la sama komenclitro, Ludovik. La knabo vizitadis inter 1869 kaj 1873 la "realan lernejon" de Bjalistoko, kaj de decembro 1873 ĝis julio 1879 la "Filologian Gimnazion" de Varsovio. Post du jaroj de studenteco ĉe la Medicina Fakultato en Moskvo kaj kvar jaroj ĉe tiu de Varsovio, li ricevis sian kuracistan diplomon; sed, tro impresigema antaŭ la suferoj de la malsanuloj kaj de la mortantoj, li, post mallonga praktikado, elektis la specialaĵon oftalmologio, kaj iris ĝin elstudi en Vieno (1886). Li edziĝis en 1887 — kaj ĝis 1897 serĉis, unue en Varsovio, poste en Ĥerson, en Grodno ktp. krei al si klientaron sufiĉan por vivteno. En la komenco de 1898 li definitive hejmiĝis en la juda kvartalo de Varsovio, kie li praktikados ĝis sia morto, la 14.IV. 1917. Tiu medicina kariero, kvankam konsciencie kaj ame plenumata, alportis al li multe pli da zorgoj ol da profito; pro la malriĉeco de siaj klientoj, li devis akcepti ĉiutage 30 ĝis 40 el ili, kaj ricevis nur sufiĉe por certigi modestan vivon al sia familio (tri infanojn li havis). Cetere, tio estis nur malĉefa parto de lia aktiveco.

Lia karaktero

La juna Zamenhof estis tre inteligenta kaj tre laborema, ĉiam la unua en siaj klasoj kaj ĉiuj liaj kamaradoj profetis al li brilajn sukcesojn. Li havis apartan dispozicion por la lingvoj; tri li parolis libere, la rusan, polan kaj germanan, tri li legis flue, la latinan, la hebrean kaj la francan — se ne paroli pri la jida, nur parolata ĵargono, kiun li esploris dum du jaroj, kaj pri kiu li ellaboris tutan gramatikon; pri la greka, la angla, la itala kaj kelkaj aliaj, li havis



Familio Zamenhof ĉe bulonja kongreso

VIKIPEDIO

okazan kaj pli teorianton. Sed li ĉiam rigardis la rusan kiel sian hejman lingvon (nur en ĝi kaj en Esperanto li skribis iam versojn), kaj Litovujon li sentis kiel sian patrujon (probable ĉar li pasigis siajn plej feliĉajn feriojn en Vejseje).

Tiu poligloto estis nur la respiegulo de la kondiĉaro, en kiu li vivis, kaj kiu ne povis ne influi sur la penson de tiel sentema knabo, kune kun la neforviŝebla spuro de la hebrea mistikismo kaj la hereda kredo al misia tasko de lia gento. Vivante, ekde la infaneco, en mezo de popolmiksaĵo (en Bjalistoko loĝis en 1897 66% da judoj, 18% da poloj, 8% da rusoj, 6% da germanoj kaj 2% da belorusoj); apartenante al raso, kiu povis esprimi sin nur per malviva aŭ per malpropra lingvo, kaj, disigita inter la nacioj, ne povis ĝui la rajtojn de la ceteraj nacioj; edukite laŭ la klerisma principo, ke ĉiuj homoj estas egalrajtaj fratoj, lia denaska idealismo inspiris al li obsedan revadon pri unuiĝo de la homaro en harmonia egaleco. Kaj pro lia aparta naturdoto, tia revo rapide identiĝis kun la revo de universala lingvo, kiu, sennacia kaj neŭtrala, redonus al la judoj la sendependecon kaj ebligus al la homaj grupoj pli bone interkompreniĝi.

La unuaj provoj

Tiun revon Zamenhof serioze konsideris jam en siaj gimnaziaj jaroj. Laŭ la natura malvolviĝo de la ideoj, la knabo, sensecie repaŝante la spurojn de multaj antaŭirintaj utopiistoj, ekpensis unue pri reviviĝo de la mortinta latina lingvo; poste pri tute apriora lingvo, kies vortoj konsistis el la matematika serio de ĉiuj elparoleblaj kuniĝoj de literoj (a, aa, ab, ac ... ba, ca, da ktp...). Sed, kaj en tio montriĝis lia propra genio, ĉiun

VIKIPEDIO



Gesinjoroj Zamenhof kun gefiloj Adamo kaj Lili [Lidia], 1916

novan sistemon li elmetis al praktikado, kaj spertinte ties difektojn, anstataŭ blinde obstini en senelirejo kiel faris la tiamaj interlingvistoj, li kuraĝe antaŭensercadis. Lia studo de la angla lingvo instruis al li, ke la riĉaj deklinacioj kaj konjugacioj de la antikvaj kaj slavaj lingvoj estas tute ne necesaj; la funda esploro de la rusa kaj de la germana montris al li, kiom bona elekto de taŭgaj afiksoj povas maldikigi la vortaron; la pola kaj la germana malkovris al li la ekziston de jam preta trezoro da internaciaj vortoj; la germana kaj la franca pruvis la utilecon de la difina artikolo, nekonata al la slavaj; ktp. ktp. De ĉiu lernitaĵo li tiris frukton por sia kara projekto, kaj, dum la ferioj de 1878, li finpretigis sian lingvon sub la nomo “Lingwe Uniwersala”: unu gramatiko, unu vortaro, kelkaj tradukaĵoj kaj eĉ originalaj versoj. Sed tio, kion la okaklasa gimnazio kredis definitiva, prezentis nur la unuan el la ŝtupoj, kiuj devis konduki lin al Esperanto.

El tiuj “pra-Esperantoj” konserviĝis malmulto: nur du stadioj estas iom konataj al ni, tiu de la gimnazia projekto en 1878, kaj tiu de la nova projekto, ellaborita dum la ferioj de 1881-1882 far’ de la varsovia studento. La unua montras la junan lingviston precipe atenta al la internacieco de la radikoj kaj de la finaĵoj (pluralo per -s, infinitivo per -are ktp.), kaj al la simpleco de la gramatiko (nenia kazo). En la dua, ni konstatas, ke, elprovante plu sian lingvon, kaj elparolante ĝin, li ekkonsciis pri aliaj bezonoj, notinde la belsoneco (kaj li de tiam rezignas pri la internacia s-pluralo) kaj la klareco (kaj li de tiam alprenas akuzativon); sed, kiel ofte okazas, li puŝas tro malproksimen tiun serĉon de la oportuneco en la parola uzado, decidante, ekzemple, unusilabigi ĉiujn ofte uzatajn radikojn, de tio, multaj neakcepte-

blaj kripligoj, kiuj igas tiun formon de lia lingvo preskaŭ nekomprenebla je la unua vido. Inter la jaroj 1882 kaj 1885, li evidente sentis tiun eksceson, kaj provis trovi kompromisan solvon, kiu kontentigos, almenaŭ parte, ĉiujn postulojn de lingvo destinita al ĉiuj homoj kaj

ĉiaj uzoj. En la jaro 1885, en kiu li ankaŭ doktorigis, li jam fiksas Esperanton tia, kia ni ĝin konas en ĝia vortaro kaj gramatiko. La du jaroj, kiuj pasis en la vana serĉado de eldonisto, ĝis li decidis eldoni mem sian verkon, la 25.VII.1887, montris al li la malfacilojn, kiuj atendis lin ĉe la propagando: tial li rezignis pri la imperfekto (finiĝanta per -es) kaj pri pluraj sufiksoj, kiuj ŝajnis ne absolute necesaj. Li konsciis pri la nepra postulo, ke la lingvo aperu kiel eble plej simpla.

Naskiĝo de Esperanto

Per la kvar broŝuroj, respektive en la rusa, pola, franca kaj germana lingvoj kaj subskribitaj de la pseŭdonimo “D-ro Esperanto” (kiu nomo poste forglitis al la lingvo mem), li elmetis sian projekton de “lingvo internacia” al la kritiko de la spertuloj, kun la promeso, ke, post unu jaro, li perfektigos ĝin laŭ la proponataj plibonigoj. Tiujn broŝurojn li dissendis al multaj eŭropaj gazetoj, revuoj, societoj ktp. Li reklamis per anoncoj en rusaj kaj polaj gazetoj. Uzante, kun ŝia konsento, la doton de sia edzino, li, en la jaroj 1888-1889, lanĉis tutan serion da libroj, la “Duan Libron”, la “Aldonon al la Dua Libro”, la “Neĝan Blovadon” kaj “Gefratojn” (tradukitajn de A. Grabowski), la tradukojn de la “Dua Libro” kaj de la “Aldono”, „Mezan Vortaron Germanan”, “Plenan vortaron Rusan”, anglan kaj svedan lernolibrojn, “Princinon Mary” (tradukitan de E. von Wahl), “Adresaron”, kaj li ankaŭ donis la monon necesan por la eldono de la propagandaj verkoj de L. Einstein kaj H. Phillips. En la fino de 1889, pro tia granda pres-aktiveco kaj ankaŭ pro ofero de granda sumo, kiun li faris por ŝirmi sian pa-

tron kontraŭ la rankoro de moskva cenzuristo, li estis plene ruinigita. De tiu tempo, kvankam li restis ĝis 1905 la ĉefa motoro de la movado, la propagando materiale dependis de la unuaj varbitoj kaj de iliaj monrimedoj.

Kia do prezentiĝis la nova lingvo? Tri karakteroj unuavide frapis la observanton: 1-e ĝi estis, per la elekto de la radikoj kaj de la afiksoj, tiritita ĉefe el la romanaj kaj germana lingvoj, vere internacia kaj facile komprenebla por la kleruloj; 2-e ĉiuj ĝiaj radikoj estis senŝanĝaj, ĉiuj ĝiaj gramatikaj distingo estis esprimitaj per apartigeblaj fonetikaj elementoj, kaj la vortoj konsistis nur el kunmeto de tiuj radikoj kaj de tiuj elementoj – tiel ke la plena lingvo, gramatika same kiel leksikona, troviĝis en la vortaro kaj povis esti komprenata eĉ de homo, kiu neniam ĝin lernis; 3-e tiu lingvo, kvankam konsistanta el nacilingvaj eroj, estis plene aŭtonoma kaj havis propran individuecon.

Zamenhof kiel lingvisto

La dua parto de la aktiveco de Zamenhof sur la kampo de la lingvo internacia daŭris inter 1905 kaj lia morto en 1917. Ĝin ebligis la liberaj tempoj, kiujn havigis al li la jam kreskintaj profitoj de liaj eldonaĵoj kaj precipe la enspezoj de liaj kontribuajoj al “La Revue”, kreita de la firmo Hachette dank’ al la interveno de Carlo Bourlet. Ĝi alprenis precipe tri formojn: prilingvaj verkoj, tradukoj kaj ideologiaj eseoj.

En la prilingvaj verkoj estas aparte rimarkinda la singardemo kaj toleremo de la aŭtoro. Zamenhof liveris komence nur la minimumon, 16-regula gramatiketon kaj 917-radikan vortareton, “lasante ĉion alian al libera iom-post-ioma ellaborigado”. Ĉiam li evitis aldoni al tiu primitiva fundamento novajn devigojn, li timis ĉiujn precizigojn, kiuj fariĝus katenoj. Preskaŭ sur ĉiu paĝo de liaj “Lingvaj Respondoj” (kolektitaj libroforme en 1912), oni trovas la saman sintenon: “Nur la uzo iom post iom ellaboros definitivajn regulojn... Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj... Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem nur katenus... En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezzone nin malliberigi? ...” ktp.

Sed tiu toleremo, kiu celis fari la evoluon de Esperanto vere kolektiva laboro, estis ebla nur ĉar la bazoj de la lingvo estis firmigitaj kontraŭ ĉia ŝancelo. Tion li atingis, havigante karakteron de netuŝebleco al la

tri verkoj “Plena Gramatiko”, “Ekzercaro” kaj “Universala Vortaro”, kiujn li kolektis en 1905 sub la titolo “Fundamento de Esperanto”. Por ke iu ajn lingvo povu regule kreski kaj disvolviĝadi, estas necese, ke enestu en ĝi ia potenco incerciforto, kiu konservas al la ĉefaj elementoj de tiu lingvo oportunan sensanĝon kaj stabilecon, neprajn kondiĉojn por interkompreniĝado. En la naciaj lingvoj, tiun incerciforton prezentas la jarcenta tradicio; en Esperanto, kie tia tradicio ne ekzistis, Zamenhof anstataŭigis ĝin per la Fundamento, kun sia karaktero de “netuŝebleco”. Tiu lingva tabuo estas, post la kreado mem de Esperanto, la plej genia elpenso de ĝia aŭtoro. Ĝi certigis al ĝi senriskan evoluipovon, tiel ke, en la ĵus eldonita “Antologio (*de la originalaj esperantaj poemoj*) 1887-1957” la leganto spertas nenian malfacilon pro la verkadato de iu ajn peco.

Zamenhof kiel tradukisto

La tradukoj prezentas en la verkaro de Zamenhof la plej ampleksan parton, kaj la plej gravan. Lia unua traduko (*La Batalo de l'Vivo*, de Dickens), ĉar ĝi aperis libroforme nur en 1911, kvankam felietone publikigita en 1891, ne havas grandan influon. Sed jam la dua (*Hamleto*, de Shakespeare), kiun li publikigis en 1894, kaj republikigis en 1902 en Parizo, ĝuis senkomparan influon kaj pli efikis por la disvastigo de la lingvo, ol ĉiuj plej lertaj teoriaj admonoj. Responde al la kritikoj de reformistoj, li brile pruvis la taŭgecon de Esperanto por eĉ literaturaj taskoj. Tiun fekundan laboron li rekomencis nur post la fondo de “*La Revuo*”, por kiu li entreprenis sisteman tradukadon de gravaj literaturaj verkoj. Tiel sinsekve aperis: *La Revizoro* de Gogol (1907), *La Predikanto*, el la Biblio (1907), *Georgo Dandin* de Molière (1908), *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe (1908), *La Rabistoj* de Schiller (1908), *La Psalmaro*, el la Biblio (1908), *La Rabeno de Baĥaraĥ*, de H. Heine (1909), *La Gimnazio*, de Alejhem (1909), *Marta* de E. Orzesko (1910), *La Proverbaro* (1910), *Genezo* (1911), *Eliro*, *Levidoj* (1912), *Nombroj Readmono* (1914), ĉiuj kvin el la Biblio.

Je sia morto, Zamenhof lasis, manuskripte, la kompletan tradukon de la *Fabeloj* de Andersen (tri volumoj aperintaj inter 1923 kaj 1932), kaj la tuton de la *Malnova Testamento* (eldonita en Londono, 1926, de la Brita Biblia Societo).

Oni povas miri antaŭ la nombro kaj am-

plekso de tiuj tradukoj, precipe en la jaroj 1907-1909; verŝajne kelkaj el ili estis jam pretaj; sed lia rapideco en la laboro restas eksterordinara: se oni memoras, ke li povis labori nur en la vespero, post longa laciga tago, oni demandos sin, kiel li povis efektiviĝi ekzemple la *versan* tradukon de Ifigenio en la daŭro de kvar monatoj (marto-junio 1908). Evidente, tia rapideco ne malhavis kelkajn difektojn; sed ĝi havas ankaŭ siajn avantaĝojn: ĝi konservis al la tradukoj viglan, fluan stilon, sen ia ajn kabineta pedanteco. Kaj precipe grandega estas ilia valoro por la lingva evoluado. Ili pruvis efektive al ĉiuj kontraŭdirantoj, ke “Esperanto povas servi kiel lingvo por libera esprimado de ĉiuj geniaj verkoj de la homa literaturo”; ili kontribuis al la riĉiĝado de la vortaro pro la neceso redoni kelkfoje subtilajn idenuancojn de la beletraj ĉefverkoj; ili helpis al la ellaborado de la stilo, devigante al penado por “en tiu aŭ alia maniero nepre traduki tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre devas posedi”; ili progresigis Esperanton al “kreskanta elasteco” kaj fleksebleco, ĉiam memorigante al la verkistoj, ke “nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la vivo”; fine ili stabiligis kaj fiksas la idiomajojn, prezentante kvantegon da kunmetaĵoj, vortkonstruoj, metaforoj kaj proverboj, komunan trezoron da pretigitaj difinitaj parolturnoj, kiujn la leksikologoj kolektis en siaj vortaroj kaj verkistoj uzadas por la pli granda unuecigo kaj kohereco de la lingvo. Oni ne troigus la rolon de la Zamenhofaj tradukoj dirante, ke sen ili, Esperanto ne vere ekzistus: ĝi estus pala teoria fantomo, kiel estis aliaj projektoj. Per siaj gramatikaj kaj leksikonaj verkoj, Zamenhof estis konstruinta la skeleton de la lingvo; per sia persista tradukado, li vestis tiun ostaron per sukplena, sangriĉa karno. La animon oni serĉu cetera en liaj originalaĵoj.

Zamenhof kiel pensulo

Dank’ al la kreskado de la afero kaj al la entreprenemo de kelkaj francoj, inter ili Michaŭ kaj Bourlet, oni povis la unuan fojon en la historio de la homaro, kunvenigi en Bulonjo-ĉe-Mar, en 1905, kongreson de homoj diversnaciaj, kiuj parolis ĉiuj la saman lingvon kaj sentis ĝin sia egalrajta posedaĵo. Estis por Zamenhof la okazo insisti pri la morala kaj socia valoro de tiu homara akiraĵo. La sekvantan jaron, en Ĝenevo, li esprimis antaŭ la kongreso siajn profundajn konvinkojn, ke la Lingvo

Internacia estas antaŭ ĉio rimedo alproksimigi la homojn unuj al la aliaj, kaj ekzalti tiun humanecon, tiun universalan fratecon, kiu ŝajnas al li la sola formo de kulto akceptebla por ĉiuj gentoj kaj ĉiuj eklezioj. Tiele li provizis la lingvon per unuiga kaj fortikiga ideologio. Se ankoraŭ hodiaŭ, pli ol 40 jarojn post la morto de Zamenhof, la Esperanta afero vekas tiom da admirindaj sindediĉoj, da fidelecoj kaj eĉ da sinoferoj, tion oni ŝuldas al la genio de ĝia iniciatoro, kiu sciis, ke ne estas granda kaj fruktodona hom-aktiveco sen ia interna sentoardo, sen ia korveka idealo. Tiel, jaron post jaro, de 1905 ĝis 1912, li elvokis antaŭ la kongresanoj ĉiujn grandajn demandojn, ĉiujn grandajn problemojn, kiujn la vivo metis al tiu senprecedenca socia-lingva movado, kaj la altajn celojn, kiujn ĝi devas aspiri. La kolekto de tiuj kongresaj “Paroladoj” (kompilitaj en Japanujo, de Tasku Sasaki kaj Ĵuntaro Iŭŝita, 1932), estas emocia kaj animaltiga legaĵo, unu el tiuj ne multaj verkoj, kiuj honorigas a homaron.

Sed kun la tempo, tiu rolo de gvidanto de



La strato Dzika en Varsovio – nun strato Zamenhof – en la tempo kiam loĝis tie Zamenhof



En la sama strato: ruinaĵo de la domo kie vivis Zamenhof. En 1945 la varsoviaj esperantistoj metis tien la Esperanto-flagon



La sama loko en la sama strato en 1959: en la muro de nove konstruita domo memortabulo estis fiksita kaj malkovrita dum la Jubilea Kongreso

la konsciencoj ŝajnis al li tiel grava, ke li decidis, en 1912, lasi la destinon de Esperanto al la jam elprovita "Lingva Komitato", kaj dediĉi sin al pure ideologia agado. Li provis, per diversaj plibonigitaj projektoj ("Hilelismo", "Homaranismo"), trovi terenon de interkonsento por ĉiuj sinceraj kredantoj, ĉu ili apartenas al iu eklezio, ĉu estas liberpensantoj. La teruran problemon de la rasismo li pristudis en rimarkinda "Memuaro por la Kongreso de Rasoj" (1911), en kiu li demonstris, ke la kaŭzo de la intergenta malamo estas la reciproka malfido naskita de la alieco de lingvo kaj de religio. En 1914, li volis uzi la okazon de la Universala Esperantista Kongreso en Parizo, por tie kunvoki ankaŭ unu "Kongreson de Neŭtrala Religio", kiu difinuis la principojn de tia pure spirita religio – laŭ la instruo de la lasta profeto el lia raso: „*Nek sur tiu ĉi monto, nek en Jerusalem... sed en spirito kaj en vero*". En 1915, meze de la ŝtormoj de la unua mondmilito, li verkis gravan "Alvokon al la Diplomatoj", avertante ilin, ke la ĉefa kaŭzo de ĉiu milito ĉiam estis "la regado de unuj gentoj super aliaj gentoj", kaj ke ilia ĉefa devo, ĉe la estonta packontrakto, estos certigi al ĉiuj gentoj, interne de la regnoj, la egalecon kaj la liberecon, ĉar nur tiuj ebligas la fratecon.

Tiaj estis la lastaj penoj de tiu granda koro, kiu, tutlonge de sia vivo, efektive batis nur por la bono de la homaro kaj la ekregado de la paco.

Zamenhof kiel homo

Zamenhof estis malaltstatura, kun bar-

beto brungriza kaj frutempe kalva kapo. Li ports pormiopajn okulvitrojn. Li ne estis oratoro, kaj misprononcis la siblantajn konsonantojn. Li multe fumis, precipe cigaredojn. Jam de ĉirkaŭ la jaro 1900 li suferis je malforteco de la koro kaj manko de pulso en la piedoj. Tial, kiam liaj enspezoj tion ebligis li vizitis germanajn ban-urbojn: Bad-Reinerz (1906, 1909), Bad Nauheim (1907), Bad Kissingen (1911), Bad Salzbrunn (1912), Bad Neuenahr (1913).

Li estis, kiel lia patro, pedante ordama en la ordinara vivo, naiva en komercaj aferoj, timema antaŭ publiko, malinklina al ĉiuj oficialaj ceremonioj. Nature modesta kaj pacama, li penis mildigi ĉiujn konfliktojn ĉirkaŭ si, kaj neniam montris ian resenton kontraŭ siaj ofendintoj. Li estis unu el tiuj maloftaj homoj, kiuj ludis gravan internacian rolon, kaj tamen havas nenion por timi el la publikigo de lia tuta korespondado: ĝi rivelas nur lian denaskan ĝentilecon kaj lian altan senton pri justeco.

Sed plej gravaj trajtoj de lia karaktero estis la volo, per kiu li ĉion oferis por siaj idealoj, kaj la pacienca obstino, per kiu li forpuŝis ĉiujn obstaklojn al ilia efektiviĝado. Kaj tiun volon kaj tiun paciencon li ĉerpis el la vere senmezura amo, kiu instigis lin alporti, per ĉiuj fortoj de sia korpo kaj spirito iom da helpo al tiu fizike kaj morale blindiĝinta homaro.

Tio ĉi estas elĉerpaĵo el la *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*, eldonita en 1960 (UEA), el la privata kolekto de Frans Jahger.

Teksasa Knabino

(tradicia kanto; traduko de George Baker)

Mi pasigis mian vivon
Pensante kun bedaŭro:
Nur tion mi ŝatis fari,
Plurajdi mian ĉevalon.

Mi ĉiam ridis gaje,
neniam spertis sopiron,
Ĝis fine teksasa knabino
forŝtelis mian koron.

Kie la pigra Riogrand'
Vagadas al l'oceno',
Jen tie ŝi dediĉis sin
Al mi por la etern'.

Sed l'anĝeloj ekenviis
Rideton ŝian kaj belon,
Kaj dum ŝtorma nokt', mian karan
forprenis en la ĉielon.


La birdoj ĉesis kanti,
Malĝoje mutas la land'
Sopirante mian karan
Ĉe la pigra Riogrand'.

Ŝiaj lipoj ruĝis kiel vino,
Bukliĝis la haroj en ond'
Ŝiaj vangoj ŝajnis kiel tag-aŭror'
Ekbrilanta super la mond'.

Ŝi iris kaj lasis min sola,
Sen ŝia tuŝo de man',
En la nokto dum mi vagas
Laŭ la pigra Riogrand'.

Kie la pigra Riogrand'
Vagadas al l'oceno',
Jen tie ŝi dediĉis sin
Al mi por la etern'.
Sed l'anĝeloj ekenviis
Rideton ŝian kaj belon,
Kaj dum ŝtorma nokt', mian karan
forprenis en la ĉielon.
La birdoj ĉesis kanti
Malĝoje mutas la land'
Sopirante mian karan
Ĉe la pigra Riogrand'.

De leganto



New from the Book Service

AFERO DE ESPERO. *Heidi GOES.* A history of the Esperanto movement in Africa, from its earliest days to the present. 2007. 86p. 210x145. Paper. The Netherlands. ISBN 978-929017096-9.

AFE002 \$15.70

AFIŜO "LA ALFABETO DE ESPERANTO". Attractive color poster showing Esperanto's 28 letters and an animal or object associated with each one. Includes a second, smaller poster containing several words for each of the letters in question. 2007. Approx. 500x700. Paper. The Netherlands.

AFI007 \$4.60

BELETRA ALMANAKO N-RO 1. *Jorge CAMACHO, Probal DASGUPTO, István ERTL (eds.)*. First issue of a new semi-annual literary almanac, published in New York. Contains all forms of literature, including the award-winning entries in the 2007 Belartaj Konkursoj of UEA. 2007. 176p. 210x130. Paper. USA. ISBN 978-1-59569-071-5.

BEL008 \$13.30

ESPERANTO BY DIRECT METHOD. *Stano MARCEK.* Supplementary materials by Roy McCoy. 22-lesson direct method course of Esperanto. Words are defined by accompanying illustrations and include the 750 most commonly used words in Esperanto, from the Baza Oficiala Radikaro. Includes English vocabulary list with each lesson and English-Esperanto and Esperanto-English vocabularies at end of book. Illustrated by Linda Marceková. 2007. 115p. 250x175. Paper. Slovakia. ISBN 978-80-969667-4-5.

ESP062 \$17.70

GLUMARKOJ ROTERDAMO. Sheet of 12 stickers commemorating the 2008 World Esperanto Congress in Rotterdam. Use them on letters to remind your friends of Esperanto's existence and utility.

GLU004 \$2.20

HELIKO SUR DEKLIVO. *Arkadij & Boris STRUGATSKIJ.* Trans. Mikaelo Bronŝtejn. A tale of two worlds, Administration and Forest, and their two protagonists, Perek and Kandid. And

within each of those worlds bubbles strange and incomprehensible life. 2007. 247p. 200x130. Paper. Russia. ISBN 978-5-7161-0168-5.

HEL002 \$27.10

INSTRUAJ BILDOJ POR REKTMETODA INSTRUADO. *Linda MARCEKOVÁ.* 250 pictures on cards to accompany the textbooks *Esperanto per rekta metodo* and *Esperanto by Direct Method*. 2006. Package. Slovakia.

INS007 \$67.40

LINGVAJ KAJ HISTORIAJ ANALIZOJ. *Detlev BLANKE (ed.)*. Acts of the 28th Esperantological Conference in the 90th World Esperanto Congress, Vilnius, 2005. Includes papers by Oxana Bourkina, Aida Čížikaitė, Toon Witkam, Sébastien Moret, Christian Lavarenne and Andreas Künzli. 2007. 92p. 300x210. Paper. The Netherlands. ISBN 978 92 9017 098 3.

LIN023 \$21.70

LINGVO SERENA, LA. *Baldur Ragnarsson.* A complete collection of this author's previously published poetry and his various essays about Esperanto and language. Includes all of *Ŝtupoj sen nomo* and *Esploroj*. Essays generally fall into the categories *Pri la Esperanta literaturo originala kaj tradukita*, *Literatura teorio* and *Islandecaj reehoj*. Introductions by Mauro Nervi, Renato Corsetti, Marjorie Boulton, Jorge Camacho, Probal Dasgupto, Edwin De Kock, Nicola Ruggiero and Humphrey Tonkin. 2007. 800p. 175x110. Bound. Italy. ISBN 978-88-7036-078-3.

SER010 \$66.70

SENDEPENDAJ HOMOJ. *Halldór Laxness.* Trans. Baldur Ragnarsson. The story of the Icelander Bjartur, who developed from a farm worker to the proud owner of his own sheep farm, about his struggle in the early 20th century against the destructive forces of nature and modern society and about his strivings to assure continued independence for himself and his family. Halldór describes in lively fashion the cultural values of the poor hard-working farmers, their beliefs, hopes, tiny successes and great losses, and their daily lives. For his work, Halldór was

awarded the Nobel Prize for Literature in 1955. 2007. 479p. 220x140. Paper. United States. ISBN 978-1-59569-056-2.

SEN012 \$26.70

SUZANA KAJ LA ĈASISTOJ DE MUSOJ. *Pio BAROJA.* Trans. Joxemari SARASUA. A collection of short stories from Baroja's first published work, *Somber Lives*, reflecting a world of poverty and mediocrity, the Spain in which the younger author lived at the turn of the 20th century, plus the short autobiographical title novel, about the life of an exiled Spaniard in the Paris of 1936. Series "Hispana Literaturo" #8. 2004. 157p. 180x110. Paper. Spain.

SUZ001 \$16.90

T-SHIRT "ONKLO ZAM BEZONAS VIN". Green T-shirt with traditional view of Uncle Zam(enhof) in uniform summoning you to duty in the army of Esperanto. Limited quantity. 2007. Size Medium. United States.

SHI102 (Medium) \$16.70

SHI103 (Large) \$16.70

SHI104 (X-Large) \$16.70

SHI105 (XX-Large) \$16.70

VIVO DE ZAMENHOF. *Edmond PRIVAT.* Reprint of the classical biography of the creator of Esperanto, with photographs. 2007. 176p. 175x125. Paper. The Netherlands. ISBN 978-929017097-6.

VIV020 \$15.70

All books listed can be ordered: by mail from ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; by telephone at (510) 653-0998; by fax from (510) 653-1468; or through our website at <https://esperantousa.hypermart.net/butiko/butiko.cgi>. For phone, fax or website orders, be sure to include a credit-card number. For some titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website. If a title is out of stock at the time of ordering, you will be back-ordered and later charged at the time the title is shipped. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar versus other currencies, all prices are subject to change without notice.

Esperantaj Vojaĝoj 2008



INTERRETO

Esperanto-USA: Landa Kongreso – 11-14 de julio, Montrealo, Kanado

okazos dum (kaj samloke kun) la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE, 11-18-an de julio) – kun ebleco partopreni ambaŭ; aliĝiloj haveblas en januaro 2008.

TAKE estas kongreso kiu okazas proksimume ĉiun trian jaron por esperantistoj en Ameriko. La 7-a TAKE okazos la unuan fojon norde de Meksik-urbo. Pro la fakto ke Usono ne facile donas vizojn, ni ne povas sukcese organizi Tut-Amerikan kongreson, kaj estis decidite ke ni pli bone helpu al TAKE per la okazigo de samtempa landa kongreso. La kongresa temo estas: “Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭripova evoluigo en la Amerikoj”. Esperanto Vojaĝ-Servo aranĝos senhaltajn flugojn el Montrealo al Amsterdamo kaj trajn-konekton de Amsterdamo al Roterdamo por tiuj vojaĝontaj al la UK. Informoj haveblas de Esperanto Vojaĝ-Servo.

93-a Universala Kongreso de Esperanto – 19-26 de julio, Roterdamo, Neder- lando

okaze de la 100-jara jubileo de la fondiĝo de Universala Esperanto-Asocio

La Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2008 Internacia Jaro de Lingvoj. Tiu deklaro inspiris la elekton de la kongresa temo: “Lingvoj: trezoro de la homaro.” La kongresurbo – Roterdamo – lastatempe fariĝis ne nur tre sukcesa komerca havenurbo, sed ankaŭ arkitekture avangarda kaj kulturoplena.

Roterdamo estas sufiĉe multtekosta urbo – speciale ĉar la valoro de la usona dolaro tiel multe falis/os kontraŭ la valoro de la eŭro (en la tago de verkado de tiu ĉi artikolo, unu usona dolaro valoris nur 0.68 eŭroj). La Malferma Tago de UEA, la 24-an de novembro, donis al mi okazon iom “studi” la urbon de la venonta UK por havigi rekomendojn pri flugoj, hoteloj, ekskursoj ktp. (Mi vizitis kelkajn sufiĉe modestajn hotelojn kaj povas helpi

al vi elekti inter la eblecoj – mi ankaŭ planas havigi la rezervojn por ni en taŭga hotelo.) La programo certe estos bunta pro tiu ĉi jubileo de UEA; ankaŭ la eblaj ekskursoj estas interesaj – speciale multaj kelkhoraj aŭ unutagaj krozoj sur la rivero Maas tra la plej granda, moderna haveno en Eŭropo ĝis la “Delta Works” kaj al la spektaklaj ventumiloj de Kinderdijk. Roterdamo estas konata kiel “Verda Urbo” ne nur pro la fakto ke ĝi estas la sidejo de la Esperanto-movado.

INTERRETO



Ĉi tiuj klinitaj “kuboj” estas parto de la avangarda arkitekturo de Roterdamo; vizitindaj kaj vere komfortaj apartamentoj. Kredu min!

Ankaŭ Esperanto Vojaĝ-Servo aranĝos postkongresan laŭriveran krozon aŭ “landan” krozon ĉirkaŭ la plej malnova, eble plej interesa urbo, Maastricht. Detalaj informoj haveblas en januaro.

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

okazos tuj antaŭ la UK, 20 de junio – 18 de julio 2008 ĉe

University of California, San Diego.

Instruistoj: Bertilo Wenningren (Svedio), Birke Dockhorn (Germanio) kaj Lee Miller. Direktoro: prof-o Grant Goodall. Kunordiganto: Ellen Eddy (eddyellen@aol.com); detaloj kaj aliĝiloj nun haveblas de Ellen.

La 5-a Azia Kongreso de Esperanto – 11-15 de februaro 2008, Benga- luro, Barato (Hindio); Temo: “Esperanto en Multlingva Azio”

Ĝi estas vere multlingva – pli ol 1500 “gepatraj lingvoj”, 87 lingvoj en la amaskomunikilaro; 23 “oficialaj” lingvoj kiujn parolas 95% de la popoloj. Imagu la gamon de sonoj, skribsistemoj, proverboj kaj ŝercoj! Barato estas ankaŭ lulilo de kvar grandaj religioj de la mondo: Hinduismo, Budhismo, Ĝajnismo kaj Siĥismo. Krome, Barato estas fama pro bongustaj manĝaĵoj. Aktiva, talenta LKK tre bone helpas al partoprenantoj. La flugkostoj estas altaj ĉar Barato situas je pli ol duono de la vojo ĉirkaŭ la mondo – sed la aranĝoj estos malmultekostaj kaj sekuraj.

Esperanto Vojaĝ-Servo
1824 Euclid Avenue
Berkeley CA 94709
Tel.: 510-531-8393
Fax.: 510-531+0152
LusiHarmon@AOL.com

Esperanto-USA
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040